HUNGARA VIVO

4
1980
11,– Ft

DU SEMAJNOJ DA SANIGA RIPOZO

en

THERMAL HOTEL MARGITSZIGET

(Budapeŝto)

giŝ 1980. 11. 30.



Rezervo de ĉambroj kaj pliaj informoj: ĉe Via kutima vojaĝoficejo aŭ ĉe la Entrepreno „Danubius" pri Hoteloj kaj Resaniga Ripozado, 1138 Budapest, Margitsziget (Margareta Insulo), Hungario.

Prezo: 18 765,— Ft por persono dum du semajnoj en dulita ĉambro
(Krompago por unulita ĉambro: 3780,— Ft.)

La prezo inkluzivas: restadon kun 14 tranoktoj, manĝadon kaj kompletan sanigan prizorgadon
(Diagnozan, kontrolan kaj finan kuracistajn ekzamenojn, planadon de la resaniga procedo, fizikoterapian prizorgadon.)

Ebloj por refortiĝo en la hotelo: naĝejo, saŭno, „solarium", masaĝo, specialaj gimnastikaj haloj.

Kompleta dentista prizorgado.
Laŭdezire speciala dieto.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193, H–1368
Aperas dumonate
XXa jaro, 1980 n-ro 3
(92)

ENHAVO

Laborkongreso de hungaraj komunistoj 122
Varga—Haszonits, Zsuzsa: Esperanto antaŭ parlamenta komisiono 123
Fenyvesi, E.: Internaciaj ŝancoj de malgrand-nacia kulturo 124
Pov, K.: Esperanta literaturo en 1979 125
Kökény, L.: Paŭlo Varsányi, grafikisto kaj esperantisto 128
Tófalvi, É.: Omaĝe al Blaise Cendrars 1913 129
Abonyi—Nagy, Á.: Renkontiĝo kun Ludmila Jevsejeva 130
Jevsejeva, L.: Nur lukto!; Strigo sur mia libroŝranko; Malsukcesa semajno; Daŭgeraj bestoj; Akurata Anjo; Ĉiu dormas; 132
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 16. *(VHZs)* 132
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo (P. A. *Rados)* 134
Intervjuo kun profesoro *Waringhien* (V. *Benczik)* 136
Gergely, M.: Pri stranga pentristo 139
Farkas—Tatár, É.: Panoramo ... 140
Szabó, I.: La Kooperativo „Interhelpo" ĉe piedoj de la montaro Tjenŝano *(M. F.)* 142
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj ... 143
Blok, A.: Dek du (N *Nekrasov*, kaj B. *Tornado)* 144
D-ro *László*, F.: Budapeŝto, urbo de banejoj 4. *(E. F.)* 146
Gaja paĝo 153
Novaĵoj 153
De Kock, E.: Dankon al du 155
Bálint, Sz.: La hundo (Paĝo de komencantoj) 156
Recenzoj de *Waringhien, Knichal, Fenyvesi* 156
Leterkesto 160

Sur la titolpaĝo:
Somere ĉe Balatono

Ni sentas dilemon...

preskaŭ ĉe ĉiu numero, kiam ni decidas: ĉu redakti specialan numeron kun iom ampleksa prezento de unu temo, aŭ rezigni pri la strebado al profundeco kaj kunmeti kiel eble plej varian revuon? Ĉi-foje ni elektis la duan vojon, kaj ne limigis nin je iu centra temo.

Sur la sekva paĝo ni donas mallongan resumon pri la Rezolucio de la 12-a Kongreso de la Hungara Socialisma Laborista Partio, kunsidinta dum la printempo: espereble tiu rezolucio aperos ankaŭ kiel aparta broŝuro, kaj informiĝemaj legantoj povos studi ĝian plenan tekston.

Intervjuo pri la laboro de la eldonejo *Corvina*, konata por la esperantistoj per verkoj kiel *La Tragedio de l' Homo, Libero kaj amo* ktp., certe interesos multajn. Literaturamantoj — kaj precipe ŝatantoj de la Esperanta literaturo — fakte povos esti aparte kontentaj pri tiu ĉi numero, ja aperas pluraj literaturtemaj artikoloj. Elstaras el tiuj detala superrigardo pri la pasintjara Esperanta beletro. Tiu ĉi kontribuaĵo de *Karl Pov* (kiu cetere identas kun la aferema Charles R. L. *Power*, Konstanta Kongresa Sekretario de UEA) aperas ankaŭ en la TEJO-revuo *Kontakto*. Dolora evento aktualigas la artikolon pri Ludmila *Jevsejeva*. Abundajn priliteraturajn aludojn enhavas ankaŭ la intervjuo kun la elstara figuro de la Esperanta kulturo, profesoro Gaston *Waringhien*.

Ne mankas ankaŭ literaturaĵoj. La porinfanaj poemoj de la *latvino-sovetianino* Ludmila *Jevsejeva* certe plaĉos ne nur al infanoj, kaj rikoltos indan sukceson ankaŭ la belega poemo *Dankon al du* de la *sud-afrikano* Edwin *de Kock*. (Jen, kiel internaciisme elasta estas nia *Hungara* Vivo!)

Redaktinto de *Enciklopedio de Esperanto*, Lajos *Kökény* prezentas sian samgeneracianon, la grafikiston Paŭlo *Varsányi*, kies nomo sonas familiare por konantoj de la jarkolektoj de *Literatura Mondo*. Ni raportas ankaŭ pri nova sukceso de Esperanto, kiun ĝi atingis antaŭ hungara parlamenta komisiono.

Certe jam nur tre maljunaj esperantistoj memoras pri la interesa historio de la kooperativo „Interhelpo", sed verŝajne ankaŭ gejunuloj volonte ekkonos ĝin.

Por tiuj niaj legantoj, kiuj abonas nian revuon per ŝtataj perantoj en socialismaj landoj, baldaŭ alvenos la tempo de reabono. Espereble, neniu nia abonanto forgesos pri tio, eĉ, kelkaj eble povos konvinki siajn amikojn, ke indas elspezi kelkajn rublojn, levojn, zlotojn, markojn, kronojn ktp. por ricevi sesfoje dum la jaro ampleksan kaj teknike belan revuon, kiu ankaŭ enhave ne postrestas al la plej multaj Esperantaj kulturaj revuoj. Ĉu?

Laborkongreso de hungaraj komunistoj

János Kádár diras la fermajn vortojn de la Kongreso

Inter la 24-a kaj 27-a de marto ĉijare kunsidis en Budapeŝto la 12-a Kongreso de la Hungara Socialisma Laborista Partio. Tiu ĉi partio, kolektanta la kremon de la hungara laborularo — ĝia membraro dum la lastaj kvin jaroj kreskis de 754 000 ĝis 812 000 — jam depost pli ol 23 jaroj portas la plej grandan socian respondecon por la progreso de nia lando. La nuna kongreso ankaŭ havis la taskon fari superrigardon pri la lastaj kvin jaroj, pasintaj depost la 11-a Kongreso en 1975, kaj difini la ĉefajn direktivojn de la agado ĝis la sekva kongreso, okazonta en 1985.

La socia prestiĝo de la Hungara Socialisma Laborista Partio estas tre granda kaj profunda en nia lando. Tiu ĉi prestiĝo sekvas ne el hierarkiaj kialoj, nome, ke tiu partio posedas la politikan potencon, sed ĉefe el tio, ke tiun politikan potencon ĝi uzas por la popolo kaj daŭre konsultante kun la popolo.

Belan ekzemplon pri tio donas la fakto, ke la tezoj de la kongreso estis vaste publikigitaj jam plurajn monatojn antaŭ la kongreso. La partio konscias, ke ĝiaj decidoj havas konsekvencojn ne nur por la propra membraro, sed por la tuta hungara popolo, tial ĝi volis koni la opinion de ĉiuj hungaraj laboruloj. Dum la antaŭkongresa tempo tiuj tezoj estis pritraktitaj praktike en ĉiuj entreprenoj, oficejoj, lernejoj ktp., kaj en tiu pritraktado vaste partoprenis ankaŭ ne-partianoj. La diskutojn karakterizis esenca konsento kaj aprobo, tamen ne mankis ankaŭ kritikaj rimarkoj, elvokitaj de helpemo, de la deziro kontribui novajn vidpunktojn al la komuna observado de la socia realo. La tutlanda demokratia pritrakto, kiel poste emfazis la gvidantoj de la partio, signife kontribuis al la konceptado de la projekto de la kongresa rezolucio. Oni povas diri, ke tiu projekto do respegulis ne nur la opinion de la membraro de la partio, sed tiun de la tuta hungara popolo. Ne estas mirinde, ke la kongreso akceptis ĝin unuanime.

La rezolucio ampleksas ĉiujn temojn kaj terenojn, kiuj rekte aŭ nerekte influas la vivon de la hungara popolo.

La unua ĉapitro pritraktas la internacian situacion kaj la eksteran politikon de Hungario. Ĝi analizas la situacion de la tri ĉefaj ŝtatogrupoj de la nuna mondo: tiun de la socialismaj landoj, evoluintaj kapitalismaj landoj kaj de la evolulandoj. Emfazante la gravecon de la paca kunekzistado, montrante la ĝisnunajn signifajn rezultojn de la malstreĉiĝo, la rezolucio atentigas pri tio, ke certaj fortoj en la kapitalismaj landoj strebas likvidi tiujn rezultojn, kaj volas revivigi la atmosferon de la malvarma milito. Kontraŭ tiuj fortoj necesas batali, kaj la Hungara Popolrespubliko, bezonanta pacan internacian klimaton por sia progreso, laŭ siaj kapabloj nepre strebas por intensigo de la internacia kunlaborado, kiu estas la sola rimedo solvi tiajn universalajn taskojn, kiel certigo de krudmaterialoj, energio, manĝaĵoj, likvido de la malsato en la mondo, protektado de la natura medio ktp.

La dua ĉapitro temas pri la sociaj kaj politikaj rilatoj en Hungario. La rezolucio ĝoje notas la unuecon de diversaj tavoloj de la hungara laborularo: laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj. Tiu unueco estas sekvo de dudekjara konsolidiĝinta politiko, kiu skrupule gardas la socian justecon en la lando.

La tria ĉapitro estas eble la plej ampleksa: ĝi analizas la hungaran ekonomion. Parolante pri la pasintaj kvin jaroj, ĝi notas, ke la lando atendeble ne sukcesos plenumi la ĉi-jare finiĝontan kvinjarplanon, tamen, la atingitaj rezultoj estas aprezindaj. La ekonomion malfavore influis la ŝanĝoj, kiuj okazis en la prezoj de la monda merkato, sed ne mankis ankaŭ enlandaj faktoroj, kiuj bremsis la progreson. Oni povas konkludi, ke dum la venontaj jaroj en la hungara ekonomio necesos doni pli da atento al terminoj kiel ŝparado, raciigo, efike co.

La kvara ĉapitro tuŝas la problemaron de la vivnivelo, vivcirkonstancoj kaj socia prizorgado. La baza celo sur tiuj kampoj dum la sekvaj kvin jaroj estos la konservo kaj firmigo de la ĝis nun atingita, ne neglektinda nivelo. Oni devas krei favoran atmosferon por tio, ke la laboruloj bone eluzu la eblojn, kiujn la atingita vivnivelo certigas por ili, kaj konforme al tio pliboniĝu ankaŭ la kvalito de ilia vivo.

La kvina ĉapitro pritraktas la situacion de ideologio, scienco kaj kulturo. Kontente ĝi notas, ke la scienca socialismo en Hungario havas firman prestiĝon, sed de tempo al tempo akiras signifan influpovon ankaŭ aliaj ideologioj. La rezolucio alvokas batali kontraŭ tiuj ideologioj, sed la armiloj de tiu batalo povas esti nur edukado, diskutoj, konvinkado.

La sesa ĉapitro pritraktas la rilaton inter la partio kaj la amasorganizajoj. Koncerne la partion, ĝi emfazas interalie, ke necesas altigi la postulojn, starigitajn antaŭ ĝiaj gvidantoj kaj membroj. La partio direktas, helpas ankaŭ aliajn organizajojn, sed tion ĝi faras ne rekte, sed pere de la komunistoj, laborantaj en tiuj organizajoj. La Komunisma Junulara Asocio, sindikatoj ktp. devas kunlabori sur siaj specialaj laborkampoj, por realigi la celojn de la partio, por kiuj celoj ja donis sian aprobon la tuta popolo.

La sepa ĉapitro temas pri la internacia agado de la partio. La Hungara Socialisma Laborista Partio opinias, ke la marksismo—leninismo estas scienca teorio, senĉese riĉiĝanta per la agado de la komunistaj kaj laboristaj partioj de la mondo. Sed la komunisma movado estas esence internaciisma movado, kaj tio neprigas konservon de firma komuna ideologia kaj politika bazo de diverslandaj partioj, por efike partopreni la internaciskalan klasbatalon. Kompreneble, ne eblas koncize doni veran, nuancitan bildon pri la kongresa rezolucio, tamen, la supra skizo almenaŭ konjektigas la dimensiojn de la plenumita laboro.

La kongreso — kiun ankaŭ la internacia burĝa gazetaro epitetis labora kongreso — elektis ankaŭ la gvidorganojn de la partio. Unua sekretario denove elektiĝis János Kádár, kiu jam depost pli ol 23 jaroj laboras en tiu posteno, kaj havas signifajn meritojn en tio, ke la lastajn du jardekojn de nia lando karakterizas seninterrompa kaj trankvila progreso sur ĉiuj kampoj de la vivo.

Esperanto antaŭ parlamenta komisiono

Okazis la unuan fojon en Hungario, ke la Ministerio pri Instruado analizis la situacion de la lerneja instruado de Esperanto, kaj pri tio raportis por la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento.

De 1911, la Esperanto-movado estis jam plurfoje temo de diskutoj kaj alparoloj en la Hungara Parlamento kaj de 1945, la liberiĝo de la lando, ĝi intense evoluis kaj ĝermis en ĝi multaj valoraj iniciatoj. Unu el ili estis — en 1976 — la propono de 140 parlamentaj deputitoj al la Kultura Komisiono de la Parlamento, kiu konsilis pritrakti kaj vaste ekzameni la lingvajn problemojn de internaciaj rilatoj, kaj la eblan internacian rolon de Esperanto*.

Tiu iniciato, pro diversaj kaŭzoj, ne povis realiĝi, sed la 14-an de decembro de 1979 ĝi realiĝis en modifita formo, kiam d-ino Mária Hanga, vicministrino pri instruado prezentis raporton al la Kultura Komisiono de la Parlamento. La kunsidon de la Komisiono partoprenis Sarolta Raffai, vicprezidantino de la Parlamento, la komisianoj mem kaj kelkaj invititoj: spertuloj de la temo kaj funkciuloj de la Esperanto-movado. Unue d-ino Mária Hanga prezentis la ministerian raporton, kaj poste la ĉeestantoj eldiris sian opinion, pliriĉigante tiel la pensojn kaj la dataron de la raporto. La vicministrino donis respondon al la alparoloj, kaj la kunsido finiĝis per la fermvortoj de János Géczi, prezidanto de la Kultura Komisiono.

Hungara tradicio de la instruado de Esperanto

„La internacia signifo kaj kultura rolo de Esperanto ĉiam pli kreskas, kaj ĝia instruado en Hungario estas tradicio devenanta ankaŭ el la laborista movado" — diris d-ino Hanga. Ŝia raporto detale analizis la situacion de la lerneja instruado de Esperanto sur la opaj edukaj niveloj. Pri tio la ministerio mem kolektis indikojn, el la diversgradaj lernejoj de la tuta lando. Parolante pri la bazlernejoj — en kiuj pluraj centoj da infanoj lernas la Internacian Lingvon — ŝi substrekis la valoran kunlaboron elformiĝintan inter la lernejoj mem, Hungara Esperanto-Asocio kaj certaj sociaj organizaĵoj, kiel ekzemple la Ŝtata Junulara Komitato aŭ la Asocio de Pioniroj. Tiu kunlaboro ebligas enkonduki eksterlernejajn formojn de la instruado, kiaj estas la fakrondoj aŭ la diversaj lernokonkursoj. La situacio de la instruado de Esperanto ne estas tiom favora en la mezlernejoj, kie la lernantoj povas elekti la Internacian Lingvon kiel nedevigan studobjekton. La vicministrino menciis ankaŭ la pretiĝantan reformon laŭ kiu, de la 1981/82-a studjaro, Esperanto estos elektebla en la mezlernejoj kiel tria fremda lingvo. En la plej alta nivelo — altlernejoj kaj universitatoj — prezentiĝas kaj sukcesoj, kaj problemoj: d-ino Hanga laŭde menciis la internacie konatan Esperanto-fakon de Universitato Eötvös Loránd.

La ministreja raporto taksis tre pozitive la edukajn kaj pedagogiajn valorojn, kiuj nestas en la lingvo mem kaj en ĝia instrua procezo. Necesas eĉ pli bone profiti tiujn valorojn, tial la Ministerio pri Instruado ankaŭ en la estonto konsideros la internacian skalon de la evoluigo, kaj klopodos kontentigi la realajn postulojn, surbaze de la eksterlandaj rezultoj kaj la enlanda tradicio de la Esperanto-instruado.

Riĉigaj pensoj de la alparolintoj

La raporton de d-ino Hanga sekvis alparoloj de la invititoj-ĉeestantoj, kiuj el diversaj fokusoj aldonis ion gravan kaj konsiderindan al la temo. Ni akcentas kelkajn pensojn de la opaj alparolintoj.

Mihály Mándics, deputito, ĉefsekretario de la Demokratia Asocio de Hungarlandaj Sudslavoj taksis dezirinde, ke ankaŭ la Ministerio pri Kulturo raportu por la Komisiono pri la rolo de Esperanto en la publika kulturo. Endre Barát, deputito, sekretario de la urba partia komitato de Szentendre, vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio proponis, interalie, ke la Ministerio pri Instruado helpu per samaj metodoj la instruadon de Esperanto, kiel tiun de aliaj fremdaj lingvoj. D-ro László Deme, profesoro pri lingvistiko en la sciencuniversitato de urbo Szeged, donis interesajn informojn pri la lingvo mem, el lingvistika vidpunkto. D-ro György Szépe, sekciestro de la Instituto pri Lingvoscienco opiniis, ke nuntempe pli gravas la kvalita ol la kvanta evoluigo de la instruado de Esperanto. Tibor Vaskó, sekretario de la Hungara Esperanto-Asocio denombris kelkajn konkretajn kaŭzojn, pro kiuj la lerneja instruado ne povis pli dezirinde disvastiĝi. Zsuzsa Barcsay, mezlerneja instruistino, gvidanto de la Instrua Komisiono de HEA parolis pri la edukaj celoj de la instruado de Esperanto, kaj menciis, ke lastatempe ankaŭ kelkaj eksterlandaj parlamentoj okupiĝis pri la internacia lingvo.

Stimulo por la estonto

La decembra kunsido de la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento estas sukceso por nia Esperanto-movado, rezulto de ĝia persista, celkonscia laboro. En la historio de la Hungaria movado tiu estas la unua fojo, ke alta oficiala forumo, kiel estas la Parlamento, tiom detale kaj zorgeme analizis la situacion de la instruado de la 90-jara Internacia Lingvo. Tio montras, ke la afero de nia lingvo ne estas plu preteratentebla, ĉiam pli evidentiĝas ĝiaj multflankaj valoroj, ĝia taŭgeco por instruado kaj, en pli altaj niveloj, por la interpopola komunikado. Eble ni ne troigas dirante, ke la Ministro pri Instruado kaj la Kultura Komisiono de la Parlamento entreprenis pioniran iniciaton; ilia atento al la internacia lingvo estas stimulo por la estonto.

Zsuzsa *Varga—Haszonits*

* Vidu en HV 1976/1.

Internaciaj ŝancoj de malgrand-nacia kulturo

Pri la 25-jara Libroeldonejo CORVINA

Laŭdire *La tragedio de l'homo* de *Madách* kaj la poemoj de *Petőfi* estas inter la plej konataj Esperantaj tradukaĵoj el la naciaj lingvoj. La ĉi-jare jubilanta fremdlingva eldonejo CORVINA eldonis ambaŭ krom aliaj belaj libroj. Por konigi ĝian agadon, ni intervjuis la ĉefredaktorinon de CORVINA, s-inon Éva *Veress*.

Via eldonejo estas preskaŭ nur laŭnome konata de vasta esperantista publiko. Bonvolu informi la legantaron de HUNGARA VIVO pri la celoj kaj faroj de CORVINA.

Inter la hungaraj libroeldonejoj CORVINA portas plejparte la taskon: konigi al la monda publiko la hungaran kulturon pere de *fremdlingvaj libroj*. Komprenu tion en tre vasta senco! Ni eldonas librojn beletrajn — ankaŭ por infanoj kaj junuloj —, pri diversaj artoj, pri historiaj kaj politikaj temoj, pri la lando mem, kaj tiel plu. Hungarlingve ni eldonas nur belartajn ilustritajn albumojn, kio cetere faciligas la similajn fremdlingvajn eldonojn. Se dezirate, mi povas citi kelkajn ciferojn: dum 25 jaroj *3900 libroj, sume en 33 milionoj da ekzempleroj*.

Tio signifas jare pli ol 150 eldonaĵojn! Surprize granda nombro, precipe se mi pensas pri la verŝajne granda traduklaboro. Kiuj lingvoj estas reprezentataj en via agado?

Tion forte determinas kompreneble niaj komercaj rilatoj, la mendoj de eksterlandaj librovendistoj, krom aliaj faktoroj. Praktike la duono de niaj eldonaĵoj iras — tradicie — al la germanlingvaj landoj. La kvinono de la tuto estas anglalingva; sekvas la franca, rusa, hispana, itala kaj nature la najbarlandaj lingvoj. Eblas ankoraŭ longe daŭrigi, ĉar ni presigis, eldonis i. a. ankaŭ en la araba, indoneza, kimra, latina, portugala, por mencii el la — por ni — malpli kutimaj. Esperanto estas jam kutima al ni: romanoj, bildlibroj, poezio estis jam eldonita de ni, kaj ni pretas ankaŭ estonte eldoni en la Internacia Lingvo.

La proporcio de la ĉefaj lingvoj ŝajnas al eksterulo surpriza, tion mi ne atendis.

La lingvaj bezonoj en la mondo alportas surprizon ofte ankaŭ por ni. Sed aŭskultu interesan ekzemplon: temas pri internacie kolektitaj „raportaĵoj" de ĉiuj ĉefurbaj arĥivoj de Eŭropo, rilate al urbhistoriaj dokumentoj. Tiun volumon, laŭ komisio de Unesko, redaktas kaj eldonas CORVINA, okaze de la Barcelona Eŭropa Konferenco. Pri la lingvo de siaj tekstoj ĉiuj arĥivoj mem decidis, kaj montriĝis, ke nur 17 ĉefurboj prezentis anglan tekston, 11 arĥivoj elektis por si la francan.

En internaciaj librofoiroj, ekzemple en Lejpcigo, centmiloj da novaj eldonaĵoj konkuras. En tiaj cirkonstancoj kiel povas vojon rompi por si malgranda nacio, kiel la hungara?

Surbaze de la jam akirita prestiĝo, ni serĉas konvenajn rimedojn. Eksterlandaj renomaj eldonejoj volonte kunlaboras kun ni por *komuna eldono* de altkvalitaj, ilian publikon interesantaj libroj. Per komunaj fortostreĉoj — mi aludas ankaŭ la altnivelan tradukon — estas preparataj tiuj libroj por atingi la plej bonan kvaliton, kaj same okazas pri la distribuado. El ĉ. 25 landoj jam preskaŭ 200 eldonejoj daŭre kunlaboras kun ni je tiaj „kunproduktaĵoj", kiuj faras jam la trionon de nia produkto. Kun Londona kaj Novjorka eldonejoj ni eldonis tiamaniere la korespondadon de Béla *Bartók*, kaj samtiel verkon de alia fama komponisto, Zoltán *Kodály* pri la hungara muzikfolkloro.

La bela aspekto, la teknike alta kvalito devas esti certe necesa kondiĉo, precipe ĉe la artlibroj.

Eĉ nepra kondiĉo! Malgraŭ zorgoj presejaj — via eldonagado havas ankaŭ tiajn, ĉu ne? — ni tamen sukcesas tiurilate: niaj libroj akiris internaciajn premiojn pro sia tipografiado, libroarta plenumo. Komune kun Oxford Univ. Press ni eldonis — rapide ĝi elĉerpiĝis — la pompe ilustritan 600-paĝan volumon de *Hoffer—Fél: Hungara popola arto*. Same brilkolore presita estas la altnivela, tamen populare ĝuebla, anglalingva *Hungara folkloro* de *Balassa—Ortutay*, baldaŭ germane eldonota. La esperantistoj konas niajn etajn foto-librojn pri Budapeŝto, Balatono, same la libron „Hungario sur bildoj".

Probable la hungara literaturo estas la plej grava programo de CORVINA?

Certe tre grava, tamen ĝi ampleksas nur malpli ol 10%-jn en nia varia abundo. La granda parto apartenas ja al la artoj: belartoj, meti-artoj, folkloro, muziko. La *Arta anatomio* de Jenő *Barcsay* iĝis furora libro, kiu aperis en 8 lingvoj — angle jam en 12 eldonoj, krome france, itale, svede, ktp. — entute en 300 mil ekzempleroj! Kelkaj universitatoj uzas ĝin kiel lernolibron. Ankaŭ aliaj brancoj akiras elstarajn sukcesojn. La „Majstro de gastronomio" de Elek *Magyar* aperis jam en 27 lingvoj, en kelkaj ĝi atingis jam dek eldonojn pliampleksigitajn, rondcifere 600 mil ekzemplerojn! Du Nobelpremiitoj, Miguel Angel *Asturias* kaj Pablo *Neruda* verkis literaturan gastronomian „gvidlibron" kun titolo *Ni gustumis Hungarion* — krom la originala hispana ĝi aperis jam en 5 lingvoj. Kaj tio ne estas kuriozaĵo, same kiel la bona merkato de la hungaraj ŝaklibroj, ekzemple pri la mondĉampion-kandidato, grandmajstro *Portisch*.

Nuntempe ne estas facila tereno en la mondo por klasikuloj. Kiel statas do pri la hungara klasika literaturo?

Mi devas konsenti ĝenerale; tamen malgraŭ ĉio ni klopodas trovi rimedojn por konigi al la internacia publiko niajn plej eminentajn verkistojn. Viaj legantoj bonŝance havis eblecon ekkoni verkojn de Petőfi, Ady, Attila József, Zsigmond Móricz, Gyula Krúdy kaj aliajn grandulojn. Ili aperas daŭre, ankaŭ en kolektoj. Baldaŭ aperos sub titolo „Gewaltmarsch" (streĉita marŝo) poemoj de Miklós *Radnóti*, kiun murdis faŝistoj je fino de la milito. Markus *Bieler*, svisa protestanta pastoro tradukis ilin germanen; li lernis la hungaran lingvon por ĝui nian poezion.

En la originala *latina* kun franca traduko ni eldonas la poemojn de la mezepoka hungara poeto *Janus Pannonius.*

De 12 jaroj ni aperigas internacian beletran *jarlibron ARION,* kiu enhavas plurlingve hungarajn poemojn, novelojn, teatraĵojn, ankaŭ tiujn de alilandaj verkistoj kun hungara traduko. Diverslandaj eminentaj verkistoj kunlaboras al tio vere sukcese. Konvenas ankaŭ la antologia formo: en dek mil ekzempleroj aperis antologio de hungaraj teatraĵoj franclingve. La Hungara Lirika Antologio — kun la Novjorka Columbia Press — ricevis seriozajn laŭdojn diversflanke.

Kaj la infanlibroj?

Pro ilia humura-eduka enhavo, ankaŭ pro la kolorpompa bildaro ili atingis mirindan famon. Centmiloj de la ORA 1x1 kaj ETA ABOCO por la 3—4 jaruloj pruvas tion, kaj ankaŭ aliaj en multaj lingvoj iĝis ege popularaj. Same la infanlibro-serio de *Janikovszky—Réber* — legebla ankaŭ en Esperanto — estas alte ŝatata en multaj landoj.

Ĉu la scienco kaj la historio havas ankaŭ gravan lokon inter la eldonaĵoj de CORVINA?

Kvankam ni ne estas scienca eldonejo — tiun rolon plenumas ĉefe la Eldonejo Akademia — ni celas ankaŭ eldonon de historiaj, literaturhistoriaj, politikaj, sociologiaj temoj, precipe en la angla, germana, franca kaj hispana lingvoj. Brila biografio de Gyula *Illyés* pri Petőfi aperas germane, ankaŭ biografio pri Attila *József,* atendata jam en pluraj landoj. Alia speco estas la religio-historio de prof. István *Hahn,* aŭ la hispanlingva verko de Salvador *Bueno* pri la kvinjarcentaj interrilatoj de Latin-Ameriko kaj Hungario. Delikataĵo estos franclingva antologio de la *finno-ugra poezio* praa, kiun tradukis franca profesoro de la *Sorbonne.* Venontjare ni eldonos post la germana ankaŭ angle kaj france la hungaran literaturhistorion de prof. *Klaniczay,* same literaturan krestomation de la hungara 18-a jarcento. Pri vivo kaj mondo de filozofo Georgo *Lukács* aperos lia verko plurlingve, kaj laste mi lasis, kvankam neniel lastgradan, la verkon de *Petőfi:* Johano la Brava — kiun la esperantistaro jam havas en bonega traduko de *Kalocsay.*

Ervin *Fenyvesi*

Karl Pov

Esperanta literaturo en 1979

Oni povus etikedi 1979 jaro de ripozo kaj retrospektivo por nia originala literaturo. Unu romano, unu romaneteca vojaĝlibro, du poemaroj kaj fasketo da verkoj pli beletristikaj ol beletraj: entute 11 originalaĵoj iel literature atentindaj.

Plej atentinda estis memorlibro kaj analizo de verkisto neesperanta, kiu estis tamen inter la plej gravaj fruaj amikoj de Esperanto (amikeco, kies sekvoj ne estis tute favoraj por la lingvo en tiu epoko): *Leo Tolstoj: La homo, la verkisto kaj la reformisto* de Victor Lebrun. Ĉi tiu verko ne havas pretendojn al objektiveco. La aŭtoro, kiu forpasis mallonge post la eldono de sia verko en 1979, estis intima persona amiko kaj disĉiplo de la maljuna Tolstoj, el kio sekvas, ke la libro estas signifa aldono al la ekzistantaj esplormaterialoj pri la aŭtoro de *Anna Karenina* kaj *Milito kaj paco.* La vivon de Tolstoj Lebrun montras — prave — nur tiom, kiom ĝi tuŝiĝis kun lia propra. La pensadon de Tolstoj li ame elmontras por ke leganto povu mem vivi plene laŭ ĝi, kiel ja faris Lebrun.

La romano *Kara diablino* de Douglas P. Boatman estas multe pli vigla ol lia pli frue aperinta *La nekonata konato* (1932), kvankam la politika naiveco de la intrigo suspektigas, ke ĝi estis verkita en la sama periodo. La rakontanto estas unu el tiuj bonintencaj senkulpuloj, kiuj tiel ofte rolis kiel aventurromana heroo tiutempe. Amikino lia kun diversaj mirigaj parapsiĥaj kapabloj lin implikas en internaciajn maĥinaciojn. La intenco de la aŭtoro estas ne pli ol distra, kaj li ne malsukcesas, malgraŭ ioma eksmodeco de iuj elementoj kaj kelkaj lingvaj neglataĵoj.

Celojn distran kaj edukan havas *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* de Tibor Sekelj, verko ŝajne aŭtobiografia pri aventuroj en sovaĝa regiono de Brazilo, kie la aŭtoro amikiĝas kun la juna indiano Kumeŭaŭa, kiu instruas pri la vivkutimoj taŭgaj por la medio. Kiel ĉiam, la aŭtoro bone eluzas sian kapablon kapte rakonti.

Pluraj eldonaĵoj, kiujn aperigis Lina Gabrielli sub la marko Plejado, enhavis tekstojn Esperantan kaj nacilingvan. Ŝia nova poemaro *Vivendo* estas ne nur du- sed plur-lingva. La kurtversaj, emociplenaj poemoj aperas kun jen itala, jen pola, jen angla, jen ankoraŭ alilingva traduko, ĉiu farita de amiko de la aŭtorino. Jam tiu lingva karnavalo faras la volumon interesa. La poemoj mem estas simplaj kaj neprofundaj, sen rigida versteĥniko.

Sesdek jarojn de poeziaĵoj (1918—1977) kolektas *Gutaro* de Avoto. (A W. Thomson). Ĉi tie regas rimo, ritmo kaj, en la plej sukcesaj eroj, sprito. Ankaŭ al la poetiko Avoto faras kontribuon per sia ampleksa 'Postskribo', en kiu li i. a. defendas la fiksforman poemon, kiun tiel multaj hodiaŭaj poetoj neglektas.

En 1978 renaskiĝis la longe (de post 1936) dormintaj Internaciaj Floraj Ludoj de Katalunujo, kaj en la posta jaro aperis la antologio de tiu literatura konkurso. *18aj Internaciaj Floraj Ludoj* enhavas ses poemojn kaj tri diverskarakterajn prozaĵojn, el kiuj lastaj plej impresas la amuza novelo de la nelacigebla Bernard Golden. Estas hontige konstati, ke la relative malgrandskalaj IFL sukcesis eldoni sian jaran kajeron, kontraste al la Belartaj Konkursoj de UEA. Konsentite, ke ne ĉiu peco en la kolekto havas eternan valoron, sed la eldono de tia libreto estas almenaŭ same kuraĝiga al la verkemo, kiel eventualaj monpremietoj.

Per siaj *Du intervjuoj* Reinhard Haupenthal sondas la mensojn de niaj literaturaj titanoj inter- kaj postmilitaj, Kálmán Kalocsay kaj William Auld. Oni trovas la hungaron ankoraŭ pli diskreta ol necesas pri la identeco de Peter Peneter, la skoton malpli diskreta ol konvenas al vicprezidanto de UEA kiam temas pri liaj opinioj rilate difinitan prezidinton de tiu organizaĵo kaj rilate la estontecon de nia lingvo. Ambaŭ intervjuoj estas ege valoraj, ne nur pro la intervjuatoj sed ankaŭ pro la klera kaj lerta intervjuanto.

Tiu skota titano cetere kontribuis sian *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto.* Li rezistas la emon al ĉionmencia kvazaŭkatalogado, kiun oni trovas ĉe iuj similaj studoj, kaj metas la fokuson al tiuj verkistoj kaj verkoj, kiujn li trovas efektive merithavaj. Se ne ĉiun opinion oni konsentas, oni konscias almenaŭ, ke tiun opinion donas unu el la plej juĝkapablaj kaj vaste legintaj anoj de nia komunumo.

Ankoraŭ pli specifan celon havas Vilmos Benczik ĉe sia *Libro de romanoj*. Li tie okupiĝas pri la ses romanoj de la unuaj du homoj, kiuj romanis originale nialingve, Henri Vallienne (1854—1908) kaj H. A. Luyken (1864—1940). La libro adekvate resumas la enhavon de tiuj verkoj, kiuj estas plejparte apenaŭ plu troveblaj, kaj donas kelkpaĝan elĉerpaĵon el ĉiu. Laboro laŭdinda, sed estas domaĝe, ke krom en dupaĝa antaŭparolo, kritikisto tiel kompetenta kiel Benczik — neglektas kritiki. Mankas eĉ fonaj biografiaj notoj pri la du verkistoj. Ni esperu, ke la libro inspiros reeldonon de la du romanegoj de Vallienne, la unua *(Kastelo de Prelongo)* simple ĉar ĝi estis la unua, la dua *(Ĉu li?)* ĉar ĝi efektive restas ĝis hodiaŭ la plej bona pure pordistra romano iam verkita en Esperanto.

Miyamoto masao estas konata kiel homo kun fortaj opinioj, kaj li ilin montras *Sarkasme kaj entuziasme* en tiutitola esearo. Voĉoj tiel severe riproĉaj, kiel tiu de Miyamoto en ekz. 'Jen ekzemplo de senutila recenzo' kaj 'Kia estas la neŭtralismo de Ivo Lapenna kaj lia kompanio?' malofte sin formulas tiel klare. Oni ne atendu ĉi tie opiniojn facile digesteblajn. La mensa furaĝo de pensanto tiel individua kiel Miyamoto havas ofte amaran guston, sed tio ne faras ĝin malpli nutra. Vilmos Benczik kontribuas utilan postparolon, 'Miyamoto, herezulo el Oriento'.

Fernando de Diego estas nuntempe nia plej konata tradukisto el la hispana lingvo, kies literaturo devus multe pli amplekse reprezentiĝi en la lingvo internacia. En 1977 aperis la plena *Don Quijote* en lia Esperantigo. Pro tiaj kvalifikoj, lia studo *Pri Esperanta tradukarto* meritas legon de ĉiu, kiu interesiĝas pri la temo. Oni atentu tamen, ke de Diego reprezentas ekstreme naturalisman skolon de la tradukarto, kun sekva insisto pri abunda kreado de neologismoj kiel rimedo por redoni ĉiun nuancon de la originalo. Al alia skolo apartenis Kabe, kies tradukojn draŝas de Diego. Sed dubindas, ĉu *La faraono* baldaŭ ĉesos roli kiel modelo por nia prozo.

Ni iru pli konkrete al la traduka kampo, kie en 1979 aperis 24 libroj el 14 lingvoj, el kiuj 2 neeŭropaj (ĉina, japana).

Kiel kutime, laŭ libronombro venkas super ĉiuj aliaj la angla; same kutime, pri tio respondecas grandparte skotoj, kvaropanoj, Auld kaj Rossetti.

William Auld esperantigis la unuan kanton de la nefinita eposa majstroverko de Lordo Bajron, *Don Johano*, formfidele tra 222 stancoj. En ĝi, la naiva heroo, edukita laŭ patrine diktita programo al kiu mankis la biologio kaj aliaj amore sugestiaj temoj, renkontas sian unuan amon kaj rapide kleriĝas tiufake. La poemo estas bela satiro, ĉefe pri la pudoro kaj hipokrito, kiuj ĉirkaŭas seksrilatojn en la homa socio, sed flanke ankaŭ pri la religio, la literaturo, diversaj samtempuloj de la aŭtoro, kaj, ne malplej grave, la eposa ĝenro mem.

Same virtuozan laboron faris Reto Rossetti ĉe la teksto de la farsa opero *La piratoj de Penzanco* de. W. S. Gilbert, al kiu muzikon aldonis Arthur Sullivan. Tia verko plena je vortludoj kaj humuraj aludoj al diversaj apartaĵoj de la tiutempa Anglujo fortimigus multajn, sed Rossetti sin montras egala al la defio. La historio pri la orfo, kiu fariĝis metilernanto inter piratoj, estas eĉ aŭskultebla en iom primitive registrita resuma versio sur kaseto. La tuto iam prezentiĝu sceneje en tefinike konvenaj kondiĉoj!

Kris Long, laŭreato de pli da konkursoj ol eblas memori (i. a. la Internaciaj Floraj Ludoj supre menciitaj), eldonis en 1979 tri kajerojn forme modestajn sed enhave riĉajn, kun poemoj de la lirikema Edward Thomas (simple *Poemoj*), kiu ĉiuverse transdonas sian amon al la angla kamparo; Emily Dickinson *(Vulkane)*, unu el la plej gravaj poetoj en la historio de la usona literaturo, kiu kun la modesteco, kiun ŝia kulturo al ŝi trudis, publikigis dum sia vivo trikvar poemojn; kaj Wallace Stevens *(Ferio en realo)*, ĉi-jarcenta usonano kun gusto por vortludoj kaj metafiziko. Estus utile, se Long serĉus eldoniston, kiu povus doni al liaj admirindaj laboroj pli indan formon, se ne paroli pri pli alta eldonkvanto (la tri kajeroj aperis en respektive 200, 300 kaj 150 ekzempleroj).

Tradukoj el la ĉeĥa eldonitaj en 1979 ŝuldiĝis al la jam en 1964 forpasinta Rudolf Hromada. Al la serio 'Panoramo' aldoniĝis *Intima triptiko*, ĉeĥa antologieto lia, ĉefe poezia. Bonvena estas la riĉeta elekto (sep poemoj) el la verkoj de Frána Šrámek, precipe 'Virino kaj la unika vir' kaj 'Morto'. Aldoniĝas du ĉapitroj el la *Riporto skribita en la pendumila mašo*, kiu cetere trovis plenan Esperantigon kiel aparta libro. Temas pri postmorte eldonitaj memoraĵoj de Julius Fučik, kontraŭfašisma ĵurnalisto mortinta en la koncentrejo Ravensbrück, pri kiu la verko ĉefe temas.

PIV difinas Maŭ Zedong 'poeto kaj ŝtatestro'. Helpon juĝi la pravecon de tiu vicordo donas la *Poemoj* de Maŭ, kiuj en bele bindita absurde malmultekosta volumeto (tri guldenoj ĉe UEA) estas certe la bonaĉeto de la jaro.

Multaj aludoj al la ĉinaj historio kaj tradicioj malhelpas tujan komprenon en multaj lokoj, des pli ke la poemoj, ĉu rekte ĉu simbole, ofte rilatas al eventoj okazintaj dum la vivo de la aŭtoro — eventoj, en kiuj li mem grave rolis. La komprenon multe helpas abundaj notoj. Grandan dankon al la tradukintoj, kiuj kun la bedaŭrinde kutima modesto de ĉinaj esperantistoj, estas anonimaj.

Pluraj Esperantaj junularaj renkontiĝoj de la lastaj jaroj inkluzivis laborgrupon pri traduko de *Asteriks la gaŭlo*, de Goscinny (teksto) kaj Uderzo (desegno). Oni utiligis amaseton da diverslingvaj eldonoj, de la franca originalo ĝis tradukoj al la angla, la nederlanda, la islanda ktp. La apero de la libro en 1979 estas merito ĉefe de Fred de Geus kiel instiginto kaj Thierry Lelogeais, kiu koherigis la diversajn tradukprovojn al sprita kaj unueca tuto. (Tio postulis iom ampleksan mencion ĉi tie, ĉar la libro mem mencias nur, ke la laboron plenumis 'Internacia Tradukrondo', kies anoj anonimas ĉinmodeste). La rezulto estas pli bona, ol eblis atendi, ĉar la ŝercoj estas ne simple laŭvortaj tradukoj el la franca, sed tute Esperantaj ekvivalentoj de la originalaj ŝercoj, bazitaj en niaj Esperantaj movado kaj tradicio. Ekzemple — aj, sed tro juke tentas la deziro ĉion elciti. Legu mem ĉi tiun belan koloran komikson, en kiu Asteriks, Obeliks kaj Miraklomiks brave rezistas kontraŭ la Romia Imperio. 'Grandan Asteriks-Volumon I' sekvu baldaŭ G. A.-V. II.

Georgo Langranĝ' donas sian trian tradukon de moderna franca dramo, *La fatomaŝino* de Ĵan Kokto'. Same kiel la du pli fruajn, ĉi tiun li tradukis ne por aldoni libron al niaj bretoj, sed por provizi materialon al la teatra trupo Tespa, kies prezenton provu trafi ĉiu kulturkonscia esperantisto. La traduko montriĝas tre bona, malgraŭ diversaj problemoj, kiujn Langranĝ' interese klarigas postparole, pri la uzita lingvaĵo. Kokto' sekvas Sofoklon, rakontante la vivon de Edipo, kiu nescie mortigas la patron kaj edzinigas la patrinon. La dramo plej sukcesas tie, kie ĝi parodias la konatan historion, en la unuaj du el la kvar aktoj.

Han Riner estas verkisto, kiu metas la propran liberecanan filozofion en la buŝon de aliaj per pastiĉoj aŭ biografiaj romanoj. Tion ni vidis jam ĉe *La kvina evangelio*, kie Riner tiucele utiligis Jesuon, kaj ĉe *La ingenia hidalgo Miguel Cervantes*. Per *La veraj interparoladoj de Sokrato* li sekvas tiun ludon, atribuante la verkon al 'Antisteno la bastardo', kiu provas korekti la misprezentojn de la Sokrataj ideoj postlasitajn de la abomeninda Platono.

La aŭtentikaj ideoj kongruas ankaŭ kun tiuj de la tradukinto, Eŭgeno Lanti. Kvankam la formo estas impertinenta, la verko estas facile legebla kaj ĝuebla.

Vintra vojaĝo estas romantika kaj lirika poemciklo de Wilhelm Müller, por kiu la forte impresita Franz Schubert poste komponis muzikon. Kajero kun la poemciklo, el la germana tradukita de Mad Mevo, aperis ĉefe kiel helpilo al spektantoj de

la viva prezento, i. a. ĉe la 64a UK en Lucerno. Denove temas pri laboro plenumita unuavice ne por la librobreto sed por la scenejo. Aplaŭdon!

El la moderna greka lingvo ni havas tre malmulte en Esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj aperis la novelaro *Homa animo*, tradukita de la aŭtorino Despina Patrinu, kaj en 1979 venis ŝia romano *Danai Vraila*. La libro rakontas la ne aparte ekscitan aŭ interesan vivon de la ne aparte ekscita aŭ interesa junulino de la titolo. Facile legebla, sed sensala.

La kulturo latinamerika reprezentiĝas en la lastaj jaroj ekster ĉia proporcio per verkoj argentinaj, kaj 1979 ja alportis novan *Antologio de argentinaj rakontoj* redaktitan de Bastono de Kordoba. Mankas noveltefinikaj avangardaĵoj (do: mankas Borges), sed la kolekto verŝajne enhavas ion por ĉiu gusto, ekde la senkompata hororo de 'La falo' de Ayala Gauna ĝis la delikata humuro de 'La amatorkuracisto' de Leguizamón. Eldontefinike, la ilustraĵoj estas pluso; la absurde multnombraj mallertaj linifinaj vortdividoj, per kiuj oni atingas rektigitan dekstran marĝenon, pli ol kompensa negativaĵo.

De la hungara verkisto Zsigmond Móricz (1879—1942) aperis du noveloj, unu, *Malriĉaj homoj*, represita el *Hungara antologio*, la alia, *Ĉiela birdo*, en nova traduko de István Nagy. Kiel la plej multaj verkoj de Móricz, *Ĉiela birdo* kritikas la tiaman hungaran socion, rakontante pri ama triangulo farmbiena. Laŭ anoncoj, baldaŭ aperos tuta romano de Móricz, *Varmega kamparo*.

Du hungaraj libroj eldoniĝis okaze de la Internacia Jaro de la Infano: la porinfana poemaro *Hund-bazaro*, kun mirinde belaj tradukoj de Kalocsay kaj aliaj, kaj *Hungaraj fabeloj* de Elek Benedek (tradukis Maria Benczik), kiu malkaŝas al ni la originon de la Esperante indiĝeniĝinta fabelkomenco 'Ĉu estis, ĉu ne estis, iam trans la Fabeloceano...' Ankaŭ ĉi tiuj verkoj indiĝeniĝu ĉe niaj denaskuloj.

De *Steloj de Eger*, historia romano de Géza Gárdonyi, aperis komiksa adaptaĵo samformata (kaj similenhava) al la pasintjara *La filoj de l' ŝtonkora homo*. Hungaroj de la 16a jarcento — precipe unu paro, kiun ni sekvas tra pluraj jaroj — batalas kontraŭ la turkaj invadintoj, inter kiuj troviĝas aparte malica unuokula janiĉaro. Povas esti, ke pliaj komiksaj adaptaĵoj, ne nur de hungaraj verkoj, aperos baldaŭ ĉe la sama eldonejo.

Mauro Nervi, kiu kontribuis en 1978 la promesplenan kolekton de originalaĵoj *La turoj de l' ĉefurbo*,

Paŭlo Varsányi: Flamoj

en 1979 donis tradukon de itala poemaro, *Blinda ermito* de Maurizio Caprile. Sensualo estas inter la pli frapaj karakterizoj de la versaĵoj, kiuj estas ‚modernaj' laŭ formo, do sen formalaj skemoj rima kaj ritma.

Estas iom arbitre klasifi la libron *Skiza historio de la utao* kiel tradukon. Ĝi ja estas studo originale verkita en Esperanto, sed estas ilustrita per multaj utaoj el la japana, sen kiuj la libro ne havus multan sencon. Certe ne troas ĉi tiu provo ponti la breĉon inter la japana kaj la, ni diru, Eŭropa poezio. La utao estas klasika, sed ankaŭ eksmodiĝinta formo, sed ĉu ĝi trairos reviviĝon? Tion opinias Miyamoto.

Maldikan poemaron de ekspacienco en psiĥiatria hospitalo, *En senvoja sovaĝejo*, peras al ni el la nederlanda Rejna de Jong. Simplaj, pensigaj versaĵoj montras delikatan sentimenton kaj provon trovi sencon en la vivo.

Tre minora populara ĝenro nuntempa estas en iuj landoj la fotorakonto. *Enuo* estas la unua tia en Esperanto. La melodrama enhavo ne kaptos multajn laŭdojn, sed la formo estas interesa, kaj ĝi trovu pliajn manifestiĝojn. Ĉi tiun verketon de Lima Cipolatti elportugaligis Sylla Chaves.

En 1979 aperis du eldonaĵoj en la serio Oriento-Okcidento. La unua rusa verko en tiu serio fariĝis *Elektitaj fabloj* de Ivan Andrejeviĉ Krilov, en traduko de la ĵus forpasinta S. Rublov. Ĝi prenos sian lokon apud *Ezopa saĝo* en nia literaturo. Ĉi tiuj poemparaboloj estas laŭ sia karaktero inter la plej universalaj literaturaj formoj, do aparte taŭgas al lingvo universala.

La alia verko en la serio estas la sciencfikcia eposo *Aniaro* de literatura nobelpremiito Harry Martinson. El la sveda ĝin tradukis William Auld (diable, li denove!) kaj Bertil Nilsson. La senespere paneinta kosmovojaĝo estas simbolo de la homa situacio, kaj la solvoj, kiujn la pasaĝeroj aplikas al sia situacio — kultoj, diboĉado, apatio, ignorado — estas solvoj kiujn ni mem aplikas. Ege inda verko, al kiu tre ĝene mankas glosoj de vortoj, kiujn la aŭtoro inventis por la poemo. Ne temas ĉiuokaze pri tre facila legaĵo, kaj tiu manko faras la legadon eĉ malpli facila. Sed la enhavo indas la penon.

Fine mi volas mencii kelkajn titolojn, kiuj tion meritas, kvankam ili pro iu aŭ alia kaŭzo (nebeletreco, nenoveco) ne eniras mian jaran statistikon. *Praktika Bildvortaro de Esperanto*, adaptita de Terence Watts de brita originalo, plenigas tre senteblan truon en la kampo de nia 'ĉiutaga' lingvaĵo. (Pli profundan kontentigon devos doni la — ni esperu, baldaŭa — apero de la Dudenbildvortaro, kiun Rüdiger Eichholz preparadas jam de jaroj.) Pri niaj historio kaj literaturo, hungaroj kontribuis elstarajn orientilojn per la dua eldono de *Gvidlibro por supera ekzameno* kaj la akompana, kronologie arangita. *Baza Literatura Krestomatio* (finfine, io por rivali al *Paŝoj al plena posedo!*). Ne sufiĉe redaktitan sed tamen tre bonvenan fontverkon pri nia historio donis unu el ĝiaj ĉefaj roluloj, Teo Jung, per sia aŭtobiografio *Ĉiu ĉiun*. Belaj kolorbildaj infanlibroj aperadis kiel kutime en Ĉinio, inkluzive de *La avinoursino*, kiu enhavas la senmortan gastronomian konsilon 'La infano kun plenventra fekaĵo estas malbongusta.' Ekster Ĉinio aperis verko same bela, kun iom alia speco de moralinstruo: *Infanoj de la mondo*, de la dana UNICEF-Komitato. Neniel amuza sed des pli impona estis la granda *Hirošima-Nagasaki: Bilda Dokumento pri la Atombombado*, kompilita, tradukita, eldonita kaj senpage dissendita de komitato en Japanujo.

Malgraŭ kelkaj elstaraĵoj 1979 estis aparte bona jaro nek por nia originala nek por nia tradukita literaturo. Aparte mankis stile interesaj prozverkoj en ambaŭ kampoj. Ĉu tiu situacio ŝanĝiĝos en 1980?



PAŬLO VARSÁNYI grafikartisto kaj esperantisto

Sur la suda parto de Buda altiĝas la iama reĝa palaco, kie nun havas ejon la Laboristhistoria Muzeo, la Budapeŝt-Historia Muzeo kaj la Nacia Galerio kun la trietaĝa kupolo. En la kupolĉambrego — sur la tria etaĝo — mi dufoje rigardadis la kolektivan ekspozicion de Paŭlo Varsányi. Kaj tiuj tagoj estis vere festotagoj, ĉar min povis ĝojigi altvaloraj grafikartaĵoj pri la plej grandaj problemoj de la homaro.

Paŭlo Varsányi naskiĝis la 15-an de marto 1902 en Budapeŝto. Li estis nur 7-jara, kiam mortis la patro, kaj la patrino edukis Paŭlon inter malfacilegaj cirkonstancoj. Sian infanaĝon li pasigis en la Nord-Hungaria urbeto Szécsény, kie li povis konatiĝi kun sorto de la kamparanoj, kun multaj malriĉuloj.

De la Budapeŝta Okcidenta Stacidomo ĝis la tiama ekstera urbo Ujpest gvidas longa strato: Váci út, sur kiu kaj en kies regiono establiĝis la hungara ferindustrio kaj ankaŭ aliaj fabrikoj. Ankaŭ ĉiloke konstruiĝis multaj „lu-kazernoj" kaj ankaŭ malgrandaj domoj kun loĝejaĉoj. Drinkejoj, malsato kaj mallumo, fulgo kaj fumo konsistigis la mizeran kvartalon. Jes, tie vivis Paŭlo de 1912 ĝis 1917.

En tiaj cirkonstancoj ŝajnas preskaŭ miraklo la vigla spirita evoluado de Paŭlo. Pri la sociaj problemoj li ricevis sufiĉe da instruoj. La medioj en la provinco kaj en la ĉefurbaj eksteraj kvartaloj havis la saman efikon.

La frue montriĝantan desegnoinklinon Varsányi evoluigis, poluradis kiel gimnaziano de la bonfama Barcsay-strata lernejo. Poste, en 1919 li multe studadis en la „Proleta Belarta Lernometiejo", kies gvidanto estis Béla *Uitz*.

Sed sekvis la jaroj de la kontraŭrevolucio, kaj Varsányi ne rajtis enskribiĝi al la Belarta Altlernejo. Anstataŭ tio li pluedukis siajn kapablojn dum tri jaroj en „libera lernejo". Tie ĉi lin instruis Adolf *Fényes* kaj la grafikartisto István *Zádor*.

Varsányi fariĝis adepto kaj ankaŭ verkisto de Esperanto. En la unua periodo de la eminenta revuo „Literatura Mondo" (1923—1926) Varsányi estis ĝia artista ĉefkunlaboranto. Li verkis eseojn, inter aliaj pri ses elstaraj hungaraj artistoj, kiujn artikolojn oni rigardas modeloj, kiuj instruas la legantojn, kiel ĝui la artaĵojn. Kiam antaŭ ĉ. 50 jaroj estis aranĝita en la Ernst Muzeo ekspozicio de Varsányi, ĉeestis ankaŭ multaj esperantistoj. La malferman parolon diris prof. Marcell *Benedek*, estiminda literaturisto, kiu dum longa tempo havis literaturan kontakton kun Romain *Rolland*.

La mondfama Nobel-premiito Romain Rolland interŝangis kelkajn leterojn kun Varsányi, kaj skribis al li i.a.: „Viaj artaĵoj estas tre belaj. Surprizis min la teno de ĝusta mezuro kaj forta sincereco, la grandlinieco kaj tiu vere proleta spirito, kiu penetras la verkojn. Mi gratulas al Vi! Permesu al mi, ke en Via nomo mi oferdonu ilin al la Laborista Universitato en Parizo, al kies fondo ankaŭ mi kontribuis. Viaj artaĵoj ornamos la kunvenejojn kaj akiros ĝojon por la frataj okuloj de la Pariza popolo." La verkisto donacis ankaŭ sian foton al Varsányi kun la sekva dediĉo: „Al la granda artisto de la popolo, Pál Varsányi kun frata simpatio. Novembro 1936. Romain Rolland."

Sed ni reiru kelkajn jarojn! En 1933 oni povis saluti gravegan majstroverkon de Varsányi, kies titolo estas: „Sagkruco". La pliaĝuloj certe rememoros, kia estis jam la komenco de la Hitlera firegado. Kaj Varsányi ne timis montri la krudan kaj kruelan realaĵon, kaj ne timis ankaŭ poste. Do kion figuras tiu ĉi „Sagkruco"? Ni vidas velŝipon de ŝtalkaska muelejo, tio elvokivas la sagokrucon, kaj tiu ĉi monstra apokalipsa muelejo muelas (!) homojn, kaj ni vidas kranio-skeleton kaj membrojn, ĉerkegon, kornikojn kaj ankaŭ tombejon. Kiu kuraĝus aserti, ke la faŝismo aspektis alimaniere ?!

Varsányi do estis alveninta en la regno de la kreanta arto. En 1934 agadis en la hungara ĉefurbo „Grupo de Socialistaj Belartistoj", kaj Varsányi aliĝis al tiu grupeto. Sed pro la tie okazintaj „senfruktaj" diskutoj li baldaŭ rezignis pri la avantaĝoj de la grupa kunlaborado kaj ekde 1935 fariĝis „soleca artisto-partizano". Ĉu kritiki aŭ konsenti kun Varsányi aŭ kun la grupo mem? — estus malfacile decidi.

Tamen estas fakto, ke por Varsányi provizore ĉesis la ebleco aranĝi ekspozicion en la patrujo. Li do sendis en kelkajn eksterajn landojn siajn gravuraĵojn.

Ankaŭ en 1933 li faris eminentan laboraĵon, la „Kontraŭfaŝistan mapon", konsistantan el 12 folioj. Tiujn presigis li mem, lia nomo estis sur la folioj, kaj li ne petis magistratan permeson (devigan!).

Ankaŭ en la nuna ekspozicio ni povas vidi kaj legi eksterlandajn gazetojn. En 1935 nederlanda gazeto sur tuta paĝo presigis lian gravuraĵon. Svisa ĵurnalo taksas la kontraŭfaŝistan serion. La svisa Socialista Partio por agitaj celoj



Paŭlo Varsányi: Ilustraĵo al la poemo de Attila József: Kanto de junaj edzinoj



Memportreto

utiligas lian lignogravuraĵon „Senlaboruloj", ktp., ktp.

Pasie ekkriantajn grafikaĵojn ekvivigis la forto de komponaĵoj kun ega spirado. Per tiuj ĉi verkoj Paŭlo Varsányi trovis por si stabilan lokon en la samtempa Eŭropa arto kune kun la grafikaj serioj de la belga *Masereel,* kun la vivoverko de la germana Käthe *Kollwitz,* kaj kun la artoserio de István *Dési Huber,* kun la gravuraĵoj „Dózsa" de Gyula *Derkovits;* atentinda karakterizaĵo ja estas, ke Varsányi sin anoncis preskaŭ samtempe kun la du nomitaj hungaraj granduloj.

Kaj liaj problemoj? Varsányi konstante revenas al la bruligaj problemoj de sia epoko, al la milito, al la malsato kaj almozpetado, al la streĉa laboro de la ministoj kaj aliaj laboruloj, al la klasjuĝistoj kaj la karcero.

Nur legu titolojn de kelkaj liaj verkoj: „Laborista morto", „Senlaboruloj", Laborista enterigo", „Antaŭ faŝistaj juĝistoj", „Maljuna vagabondo", „Strata sceno", „Forlasita loko", „Putriĝinta arbo" ktp. Nur ĉirkaŭpromenu lian ekspozicion kaj notu la subskribojn, sed nature rigardu kun doloranta koro la gravuraĵojn mem.

Tamen estas kreaĵoj, kiuj en si mem ne estas „politik"-tendencaj. Ni spektadis 6—8 bildojn pri la „patrino", aliajn pri la „infanoj", ni rigardis la gravuraĵojn pri la stalo, bakejo, pri kapitalista viro kun stomakego kaj bastono, sed ankaŭ malriĉulon kun infanoj, lignohakiston, ĉevaliston, lavistinon, melonfoiron, fruktodeŝiron, la fojnoamasigon ktp. — ĉio ĉi ja povas esti „objektiva" realaĵo, — tamen eĉ ĉe la gravuraĵo pri la bela Danuba pejzaĝo ni ne forgesos, ke ni vivis en aĉa, ekspluata socio.

Prave konstatis Ö. Gábor *Pogány,* ĉefdirektoro de la Nacia Galerio en sia malferma parolo, ke „La tuta vivoverko de Varsányi montras senperan rilaton kun la historio de lia vivo, kun problemoj de la aktuala socio. Varsányi prezentas al ni grandiozan informadon pri la pasinta duonjarcento, kiu estas spektebla spegulbildo de la eventoj de tiu tempo."

La ĉefdirektoro diris poste: „La arto de Paŭlo Varsányi estas honesta pro tio, ĉar li alportis al ni per siaj plej maturiĝintaj rimedoj tiun dramecan serion, kiu karakterizis tiun duonjarcenton. Li respegulis ion, kio estas eksterordinare karakteriza el la asociado de la simboloj, li kreas streĉiĝon per iloj de sia artismo, kaj validiĝas ne lastvice la fantazio kaj sentemo. Kion li travivis per sia fantazio, al tio li povis aldoni sian animon, sian arton."

Paŭlo Varsányi ankaŭ post la dua mondmilito — kiam li ege suferis pro la krueleco kaj turmentado de la faŝistoj — hejmenveninte plu laboris. Li pretigis en 1947 serion pri la „Ministoj", en 1953 denove prenis sian modelon el la vilaĝa vivo. Tiam kreiĝis lia „Stalo". En 1947 li kreis unu el siaj plej efikplenaj verkoj, la lignogravuraĵon „Vintro".

Ankaŭ 1947 estas la jaro, kiam kreiĝis la ĉarma lignogravuraĵo „La vojo". Patrino kaj infaneco iras sur blanka vojo, ili iras al la lumo. El la bildo respeguliĝas ĝojo, espero, optimismo. Ni el tuta koro deziras al nia kara artisto Paŭlo Varsányi, ke li dum longaj jaroj iru kaj laboru sur la sama vojo.

Ludoviko *Kökény*

Éva Tófalvi

Omage al Blaise Cendrars 1913

Mi legas viajn poemojn amiko
kaj bruruliĝas ekspreso
transsiberia
rulfaligas revojn kaj sopirojn
en ĝi — ankoraŭ dum tempo
de paco —
soldatoj de l' sekvonta milito
kun kantoj sur lipoj
kun harmoniko sur ŝultroj
Kaj poste la batalo
la militpoŝtaj kartoj
En la sendaĵo de nekonata
soldato
bildo de la hejmo laŭ imagoj
Kaj pli poste la hejmeniĝo
Kaj fine
La transformiĝo de la
rememoroj
je artefarita piedo
je artefarita mano
je artefarita okulo
aŭ je bravula ordeno

(Belartaj Konkursoj 1979
Orig. poezio; Unua premio)

Renkontiĝo kun Ludmilla Jevsejeva

Intervjuo de
Árpád Abonyi—Nagy

Strateto en la malnova urboparto de Riga. La paŝoj eĥas sur la pavimo, kies ŝtonoj certe povus rakonti ankoraŭ pri la livoniaj kavaliroj. Ĉe vojkurbiĝo gracila tureto reliefiĝas el la blua, sennuba ĉielo.

Sarkanas Gvardes, montras la ĝustan vojon la strata tabulo kaj la okuloj de la migranto scivoleme serĉas la numeron 14—5; la domon, en kiu loĝas Ludmila *Jevsejeva,* esperantista poetino, kiu nuntempe festis la 50-an datrevenon de sia esperantistiĝo.

La trietaĝa domo estas malnova. Pri ĝi mi eksciis de mia gastiganto, ke oni konstruis ĝin ankoraŭ dum la sveda periodo; do ĝi estas pli ol 300-jara.

Sur la ligna ŝtuparo mi atingis la trian etaĝon kaj je la sonorigo malfermas la pordon kara, mildvizaĝa sinjorino, kronita de arĝentblanka hararo. La patrino de la poetino afable invitas la gaston de malproksime alvenintan.

La ĉambro en kiu mi sidas vidalvide al Ludmila Jevsejeva, aspektas ĉarma, vere virina nesto. La skribotablo, fortepiano kaj la kanapo radias trankvilon, harmonion... kaj jen! Sur la libroŝranko mi ekvidas konaton! La kurbonaza strigo sidas tie, komuna konato de ĉiuj esperantistaj literaturamantoj. Ĝi vere impresas, kvazaŭ scivolemе ĝi observus la alveninton. Aŭ mi nur sentas tion pro la konata poemo de ĝia mastrino?

„Tage blinda, nokte verdokula,
Ĝi spionas min de sur la ŝranko.
Ĉu pro simpla ina scivolemo,
Pro intrigo, aŭ pro
taktomanko?"

S-ino Jevsejeva per siaj okuloj sekvas la direkton de mia gapado kaj ŝi rimarkas ridetante, ke la strigo jam tute ne estas timiga, kia iam ĝi estis.

Post ĉi tiu intertempo mi transiras al la celo de mia vizito:

— Kara Samideanino, okaze de la 50-jara jubileo de via esperantistiĝo mi deziras transdoni al vi bukedon, kolektitan el la tutkoraj gratuloj kaj bondeziroj de la hungaraj esperantistoj kaj de nia Hungara Vivo.

En ŝiaj okuloj aperas larmogutoj, kiam ŝi dankas la primemoron de la esperantistaro kaj por eviti la emociiĝon, mi interesiĝas pri la unuaj paŝoj, faritaj en nia movado antaŭ 50 jaroj.

Al la Esperanto-movado mi aliĝis en 1929, kiel 16-jara gimnazianino, en mia naskiĝurbo Riga. En tiu jaro survoje al Svedlando gastis en Riga la fama hinda esperantisto Lakshmiswar Sinha, kiu prelegis en nia gimnazio pri Esperanto. La prelego de la ekzotika gasto profunde impresis la gimnazianojn, kaj kiam nia instruisto G. Tupicin aranĝis Esperanto-kurson, inter aliaj ankaŭ mi aliĝis.

Kiel daŭris via esperantista vivo post la kurso?

Kiam mi finis mian studadon en la mezlernejo, en la jaro 1931 mi aniĝis al Latva Esperanto-Societo, kie mi laboris dum deko da jaroj kiel sekretariino kaj redaktorino de latva E-revuo „Ondo de Daŭgava". Krome mi gvidis kursojn, draman kaj turistan rondetojn. Tiutempe la esperantista vivo en Latvio estis tre vigla. Ĉiujare okazis kursoj kun lokaj kaj eksterlandaj kursgvidantoj. En la klubo funkciis biblioteko, komuna legado, dram- kaj sport-rondetoj ktp.

La esperantistaro konas vin kiel poetinon. Kiam vi komencis verki poemojn?

En la jaro 1931 naskiĝis mia unua poemo, kiun sekvis ankaŭ aliaj kaj kiujn aperigis la revuoj „Ondo de Daŭgava", „Litova Stelo" kaj „Pola Esperantisto".

William Auld skribas en sia Esperanta Antologio, ke en la jaro 1934, — do 3 jarojn post via unua poemo, — via „Nokta vizito" aperis en Literatura Mondo. Tiutempe jam signifis certan rangon por esperantista poeto, aperigi poemon en L. M. Ĝi estis rapida rezulto post kelkjara esperantista „pasinteco"; sed mi aŭdis, ke vi verkis ankaŭ nacilingvajn poemojn. Ĉu la nacilingvaj estis la unuaj, aŭ viaj E-poemoj?

Mi verkis ilin samtempe. En la jaro 1940 dum la poezia konkurso, kiun aranĝis la Kleriga Societo de Tallinn, mi gajnis laŭdan diplomon per mia nacilingva poemo „Ridetu".

Viaj poemoj „Adiaŭ Ferenc" kaj „Antaŭ la portreto de Julio Baghy" sugestas al ni amikan kontakton kun la hungaraj E-literaturistoj.

Jes, vere tiel estas. Tri nomoj: Kalocsay, Baghy, Szilágyi signifas por mi tri Homojn, kiuj malavare prilumis mian spiritan vivon. La tri talentuloj de nia kulturo malavare helpis kaj subtenis per siaj korvarmoj miajn unuajn paŝojn, direktitajn al la Verda Parnaso, kaj ili neniam postulis rekompencon.

Kiel vi kontaktiĝis kun la hungaraj literaturistoj?

Unue mi konatiĝis persone kun Julio Baghy, aŭ Paĉjo, kiel ni nomis lin. Nia Latva Esperanto-Asocio aranĝis en Riga, kaj samtempe en urbo Jelgava E-kursojn, kaj por gvidi la kursojn ili invitis nian Paĉjon. Ni amikiĝis kaj kiam la kursoj finiĝis, li reiris Budapeŝton, sed nia amikeco daŭris perletere. Dank' al Paĉjo, estiĝis kontakto ankaŭ kun Kolomano Kalocsay kaj

Ferenc Szilágyi. Al la lasta min ligis ankaŭ kunlaboro-kontakto eĉ post la dua mondmilito ĉe la revuo „Norda Prismo".

Inter viaj poemoj estas tiaj majstraĵoj, kiel ekzemple „Rozo de l'amo", kiu estas vera perlo en nia poezio pro ĝia delikateco, sed mi povas diri la saman pri multaj aliaj. Tamen kiel eblas, ke ĝis nun ne aperis de vi memstara volumo?

Ŝi mire rigardas en miajn okulojn, poste redonas la demandon: Ĉu tio dependas nur de la poeto?

En diversaj revuoj ofte aperis viaj porinfanaj poemoj. Kio motivas tiun branĉon de via poezio?

Lastatempe Esperanto estas lernata de multaj infanoj en la tuta mondo kaj la infanoj bezonas sian literaturon. Bedaŭrinde tiu estas ankoraŭ malriĉa, ĉar nur malmultaj poetoj kaj verkistoj sin okupas pri tiu problemo; forgesante, ke verki por infanoj estas honora kaj malfacila tasko. La enhavo de la poemoj kaj rakontoj devas respondi al la infana psiko. La formo devas esti trafa, la verkoj facile legeblaj, tamen ne tedaj, sen skemeco, sen didaktikeco.

Ŝajnas, ke mi pionire konstruas la vojon, kondukantan al la porinfana Esperanto-poezio. Mi laboras per fosilo, pioĉo kaj rompostango. Mi laboras en frosto kaj hajlo, portante pezan pioniran ŝarĝon sur miaj ŝultroj je nomo de tiuj, kiuj venos post mi, por daŭrigi la komencitan vojon.

Kiuj estas viaj planoj al la estonto?

Planoj? — kaj ŝi strange ridetas —, ne lasi rustiĝi mian plumon...

Nur tiom?

Mi konfesas, ke mi estas iom superstiĉa. Ŝe mi dirus al vi: jes mi laboras, mi estas plena de planoj, mi preparas volumeton de miaj, — almenaŭ porinfanaj — versaĵoj, mi certas, ke miajn purkorajn penojn kronus ronda nulo! Tio estas la kaŭzo, ke mi preferas muti malgraŭ tio, ke mi vere havas planojn, eĉ volonte mi parolus pri miaj planoj.

Sur la skribotablo folietoj denuncadas pri la menciitaj planoj. Ĉu tiuj estas viaj plej novaj poemoj?

Jam ne tute novaj, sed mi provadis aranĝi ilin kaj se tamen ili necesos por aperonta volumo... Tiujn tri bonvolu akcepti, kiel memoraĵon pri nia renkontiĝo kaj transdoni miajn varmajn dankojn kaj salutojn al la hungaraj esperantistoj, kaj al la Hungara Vivo.

Kore mi dankas Vian karan donacon kaj mi ĝoje transdonos Viajn salutojn al la adresatoj. Ankaŭ mi kore dankas la paroladon, dezirante sanon, forton kaj bonhumoron al la laboro de estontaj jardekoj...

La kruela sorto decidis alie! Ĝuste nun alvenis letero de ŝia amikino S-ino Saulcerite Neilande kun la malgaja sciigo: Ludmila Jevsejeva poreterne forlasis nin. La 28-an de januaro, 1980, irante al la laboro, subite sur la strato mortis Ludmila Jevsejeva en sia 67-a jaro. La entombigo okazis la 1-an de febr. en urbo Riga.

Finiĝis do vivoverko, pri kiu ni povas konstati, ke ĝin karakterizis lakoneco kaj dinamiko, ekstrema simpleco de la lingvo kaj ekonomio de la vortoj, sen ajna pozo. Ŝi neniam verkis por estetikuloj aŭ por snoboj, nur por sia simpla, tre amata esperantista popolo.

Bedaŭrinde la aperon de sia memstara volumo ŝi jam ne povis ĝisvivi; ĝi restis la devo de la posteuloj.

Antaŭ mi unu el ŝiaj lastaj poemoj, en kiu kvazaŭ vibrus antaŭsento pri la proksimiĝanta fato. Jen ŝia lasta mesaĝo:

Nur lukto!

Kial vi ploras kukolo,
sinkaŝe en densa arbusto?
Min ankaŭ, simile al vi,
turmentas angoro en brusto.

Ne estas ja vero, ke plor'
redonas trankvilon al koro
kaj milde forigas el ĝi
atakon de akra doloro.

Ne lasu al nigra perfort'
vin teni en sento-deliro.
Nur lukto ĝis venko, aŭ mort' —
jen sola kaj nobla eliro!

★

Strigo sur mia libroŝranko

Tage blinda, nokte verdokula,
Ĝi spionas min de sur la ŝranko.
Ĉu pro simpla ina scivolemo,
Pro intrigo, aŭ pro taktomanko?

Kurba nazo klakas kontrolante,
Kion skribas mia laca plumo:
Ĉu pamfleton, verson, nekrologon,
Ĉe kandela finbrulanta lumo.

Se perfide min forlasas Muzo,
Kaj dormemo ŝminkas pala vangon,
Ĝi ridaĉas, strabe rigardante,
Kaj senhonte montras al mi langon.

Malsukcesa semajno

Dimanĉe — perdiĝis la pupo.
Lunde — la helblua jupo.
Marde — perdiĝis la teko,
Merkrede — hundido Keko.
Ankaŭ la tago ĵaŭdo
Pasis tute, sen laŭdo.
Malbono min sekvas obsede...
Kio okazos vendrede?
Se perdiĝos frato Mate,
Ĉu mi serĉu lin sabate?

Danĝeraj bestoj

Sidas muŝo sur babuŝo
inter planko kaj plafon'.
— Homoj diras, ke danĝeraj
estas tigro kaj leon'...
Konfuzite zumas muŝo:
„Ĉu mi kredu tion? Ne!
Multe pli danĝera estas
longpieda arane'."

Ĉiu dormas

En tagmezo ĉiu dormas:
kat' murmuras, ronkas hund'.
Sub tegmento, en la nesto,
dorme pepas la hirund'.
Dormas burdo kaj abelo
sub folia verda tuk'.
Dormas pego. Ne aŭdiĝas
diligenta: tuk-tuk-tuk!
Nur la sunlulilo vakas.
Sun' el sablo flanojn bakas.

ĉapitroj el la historio

Zoltán Halász

16. La intermilita

La 17-an de februaro 1920 taĉmento de la blanka teroro murdis Béla Somogyi-n, la redaktoron de l'tagĵurnalo Népszava (Voĉo de la Popolo) kaj Béla Bacsó-n, ĝian kunlaboranton. Ilia entombigo, la 22-an de februaro, signifis la unuan amasan manifestacion de la progresemuloj, post la malvenko de la Konsilia Respubliko

La jardekon post la 1a mondmilito karakterizis solidiĝo atingita far la registaro de grafo István Bethlen. La reĝimo vestis sin „per liberala mantelo", tamen, la registaro estis arbitrema kaj ĝi senlime validigis la potencon de la alianco inter grandbienoj, grandkapitalo kaj ŝtata burokratio. La monda ekonomia krizo komence de la 1930-aj jaroj grave damaĝis ankaŭ Hungarion. Samtempe, fortikiĝis la aktivado de la komunisma partio, laboranta neleĝe. La ekonomia krizo kaj la politikaj kontraŭdiroj devigis demisii la registaron de Bethlen, kies posteulo tuj starigis esceptjuĝan tribunalon. Estis arestitaj multaj komunistoj kaj maldekstruloj, kun la celo subpremi la laboristan movadon. En julio de 1932 la esceptjuĝa tribunalo kondamnis al morto du elstarajn komunistojn, gvidantojn de la movado: Imre Sallai kaj Sándor Fürst, kiuj estis ekzekutitaj.

La sinsekvaj, ĉiam pli dekstremaj registaroj kunligis la sorton de la lando kun la faŝismo. Ĉi tiu procezo komenciĝis jam en la Bethlen-periodo, pere de subskribo de la kontrakto pri „porĉiama amikeco" kun la faŝisma Italio. La faŝismema registaro de Gyula Gömbös realigis reviziismanⁿ politikon konvenan al la agresemaj planoj de la Hitlera Germanio. En 1938, pere de



La kontraŭrevolucia reĝimo aliancis sin unue kun Italio, aprile de 1927. Maldekstre: István Bethlen, prezidanto de la registaro kaj dekstre: Benito Mussolini

la registaro de Kálmán Darányi, komenciĝis grandskala sinarmado kaj estis enkondukata la leĝo pri judoj. Post la Anschluss kaj la pakto de Munkeno — deviganta Ĉeĥoslovakion — sekvis en la vico la registaro de Béla Imrédy, kiu eĉ pli strikte aliancigis kun la gvidantaj faŝismaj potencoj. La 2-an de novembro 1938 tiuj grandpotencoj, pere de la „unua Viena rezolucio", asignis al Hungario teritoriojn de Suda Slovakio, loĝatajn de hungaraj minoritatoj; samtempe, la registaro de Imrédy subskribis la pakton „Antikomintern". La regantaj socitavoloj volis resti lime de la milito planata far Hitler. Tial ili devigis demisii Imrédy-n kies posteulo, grafo Pál Teleki atingis, ke Hungario ne enmiksiĝu en la militon kontraŭ Pollando. Sed baldaŭ la ak-



Miklós Horthy, regento de Hungario kaj grafo Pál Teleki, kiu post Béla Imrédy fariĝis ĉefministro



La Imrédy-registaro plej multe klopodis ligi Hungarion kun la faŝismaj potencoj

so-potencoj fortikigis la ligojn kun Hungario. Pere de la „dua Viena rezolucio" en 1940, estis asignitaj al Hungario kelkaj partoj de Transilvanio, loĝataj de hungaraj minoritatoj.

Teleki neeviteble malsukcesis en sia kontraŭdira politiko. Tiutempe Hitler preparis la Balkanan militiron kaj pretendis, ke Hungario partoprenu en la atako kontraŭ Jugoslavio. Teleki konjektis, ke tion la okcidentaj landoj konsiderus kiel „casus belli" kaj ne trovinta elirejon, li mortigis sin. La sekva ĉefministro, László Bárdossy, daŭrigis la

ⁿ Temis pri revizio de la landlimoj, fiksitaj en la packontrakto.

de la hungara popolo

periodo. La dua mondbrulo

linion de intensa kunlaborado kun la germanoj. La hungara armeo, post kiam Germanio atakis Jugoslavion, tie okupis la teritoriojn asignitajn al Hungario. Kaj post kiam la germanoj atakis Sovetunion, Bárdossy proklamis militon kontraŭ tiu lando, sen rajtigo fare de la Nacia Asembleo.

Pro la malfavora milita situacio, en februaro de 1942 Horthy eksigis Bárdossy-n. Miklós Kállay, nomumita prezidanto de la registaro, per sia ekstera politiko provis iom sendependiĝi de la germanoj. Rezulte de la politikaj okazintaĵoj, la movado de la Popola Fronto ekkulminis: la Hungara Komunisma Partio kaj la maldekstra flanko de la Socialdemokrata Partio proksimiĝis unu al la alia, kaj baldaŭ aliĝis al la movado la Nacia Kamparana Partio. Sed la registaro de Kállay ne reduktis la partoprenon de Hungario en la milito: 40 mil soldatoj de la 2-a hungara armeo mortfalis kaj aliaj 70 mil kaptiĝis far la sovetoj. Tio jam devigis Kállay-n provi ŝanĝi la eksteran politikon de la lando, kaj la unua paŝo sur tiu vojo estis sekreta kontrakto kun la aliancitaj potencoj, en septembro de 1943.

Dume la soveta armeo, venkinta en multaj bataloj, forpeladis la germanojn el sia patrio kaj komence de 1944 jam proksimiĝis al la hungara landlimo. Hitler decidis ne plu toleri la balanc-politikon de Kállay, kaj la germana armeo okupis Hungarion. Döme Sztójay, hungara ambasadoro en Germanio estis nomumita far Horthy prezidanto de la registaro. Tiu marioneta registaro sendis eĉ pli da soldatoj al la fronto, kaj ene de la lando *Gestapo* kaj *Sonderdienst* intense persekutadis maldeksterulojn kaj komunistojn. Duonmiliono da judoj estis deportitaj en la koncentrejojn de la germanoj. Tamen, la kontraŭfaŝismajn fortojn ne povis haltigi la teroro: en majo de 1944 kreiĝis kontraŭfaŝisma alianco, la Hungara Fronto, kiun partoprenis la Etbienula, la Socialdemokrata kaj la Komunisma Partioj — tiu lasta funkciis sub la nomo de Porpaca Partio.

La aliancitaj armeoj ĉiam pli antaŭeniris kaj sekvante Italion, sin turnis kontraŭ Hitler ankaŭ Rumanio, Finnlando kaj Bulgario. Horthy eksigis Sztójay-n, nomumis novan registaron kaj sendis siajn sekretajn delegitojn en Moskvon, kie tiuj subskribis interkonsenton pri armistico: la hungara registaro devigis sin, ke sia armeo alfrontas la Hitleran Germanion kaj kunmarŝas kun Sovetunio. Sed tiu armistico neniam validiĝis, ĉar Horthy ne antaŭpreparis ĝin, nek politike, nek militiste. La germanoj eksigis Horthy-n; la „naciestro" fariĝis Ferenc Szálasi, ĉefo de la sagokrucistoj, kiel nomis sin la hungaraj faŝistoj. Ekstreme intensiĝis la teroro, kaj la germanoj komencis prirabi la landon.

Fondiĝis la Nacia Liberiga Komisiono, kies gvidantoj baldaŭ estis arestitaj kaj ekzekutitaj. En tia situacio ne povis disvolviĝi centre direktata rezistado, kaj partizanoj organiziĝis nur en kelkaj regionoj de la lando. La laboristoj multloke sukcesis malhelpi, ke la faŝistoj malkonstruu la fabrikojn.

Rezulte de la militiroj — inter novembro 1944 kaj februaro 1945 — de la soveta armeo, liberiĝis la landparto inter la riveroj Danubo kaj Tisza, Budapeŝto kaj parto de okcidenta Hungario. Fine de 1944 kunvenis en la urbo Debrecen la Provizora Nacia Asembleo kaj establiĝis la Provizora Nacia Registaro, surbaze de la kontraŭfaŝisma kaj demokratia programo de la Nacia Fronto por la Hungara Sendependeco. Frakasinte novan germanan atakon, en marto de 1945 la soveta armeo komencis grandan ofensivon, kaj la 4-an de aprilo 1945 jam la tuta nacia teritorio estis liberiĝinta. La milito kostis al Hungario multegajn viktimojn kaj perdiĝon de la 40%-oj de la nacia havaĵo. Tiel komenciĝis la nova erao en la hungara historio.

El la hungara: *VHZS*



La 18-n de januaro 1946 estis transdonita al la ĉefurba loĝantaro la unua ponto inter Buda kaj Pest



Detruita kvartalo en Buda

Jarcentoj de la hungara literaturo

István Torda

8. La literatura revolucio

Post multaj provadoj fine, ĉe la komenco de 1908 aperis kunliga revuo de la nova literaturo, nomata *Nyugat* (Okcidento), kiu poste ĝis la jaro 1941 iĝis unu el la gvidaj organoj de la hungara literaturo. Ĉe la komenco ĝia ĉefredaktoro estis *Ignotus* — Hugo Veigelsberg — (1869—1949), sed fakte ĝin gvidis Ernő *Osvát* [Oŝvat] (1877—1929), kies nomo en la hungara literaturhistorio estas samsignifa kun la vorto „redaktoro". En la unua „heroa periodo" de Nyugat li krom unu sola piednoto neniam propran verkon aperigis en la revuo. Tion li faris ne pro malegoismo, sed ĉar liaj ĝenro, ekzistmaniero estis la redaktado. En la juĝoj, en la laboro lin gvidis la spirita sendependeco kaj la arta pretendemo, levita super ĉio. La kuntempanoj, memorante pri li, akcentas lian senpartiemon. Li interesiĝis nur pri la arta valoro. Sekve, se temas pri la baza problemo de la estetiko, li montriĝas adepto de la „arto por arto". La historio de Nyugat, lia rilato al la literaturo estas tamen pli komplika. Ĉar Nyugat estis ne nur forumo de verkistoj kaj poetoj, starantaj proksime al idealoj de la „pura arto", sed ankaŭ tiu de Endre Ady, la granda poeto revolucia.

La rondon de Nyugat kunigis unuavice la spirito de la ribelo. Ili ĉiuj kontraŭstaris la socian ordon de la duonfeŭdisma Hungarlando, ĝian kulturon, sufokantan je epigonismo. La movado ne havis komunan estetikon. La literatura revolucio de Ady kaj Móricz, nature, pli efike kaj celkonscie servis la progreson ol la „purarta" estetiko de aliaj poetoj. Sed estus simpligo de la bildo pri la moderna hungara literaturo, se oni konsederus la du tendarojn malamikaj aŭ malproksimaj unu de la alia.

„Mesio Hungara"

Endre *Ady* [Adi] (1877—1919) ne estis revoluciulo kun doktrinoj. En liaj verkoj la tradicioj de la naciaj liberigaj movadoj kuniĝis kun la ideoj kaj sentimentoj de la socia lukto moderna. Li verkis ne sole pri la grandaj bataloj de la pasinto, ne nur pri la mizero kaj koleroj de la kampularo, sed li verkis la unuajn grandsignifajn poemojn pri proletoj de la hungara literaturo. Li ne estis revoluciulo organizita. Ady sciis: li estas individuo escepta. Lian tutan vivon kaj lian tutan poezion trapenetris travivado de senlima disvolviĝo de la Mio. La Ady-a vivkoncepto estis revolucie nova kaj same revolucie nova estis la esprimo de tiu senbrida individuismo, de tiu konscio pri la propra genieco. Li nomis sin „Apolono kampula", „Heroo de la Morgaŭo", „Mesio Hungara".

Lia kariero komenciĝis per teda laboro en provincaj gazetredaktejoj. Lin vekis kaj komprenigis al li lian veran memon vojaĝo al Parizo kaj poste al Italio. Ili donacis al Ady travivon de granda, liberiga amo, komprenon de radikalismoj mondkoncepta kaj politika, li ekkonis ankaŭ esprim-manieron de la moderna literaturo. La nomon de sia amatino Adél li returnis, farante el ĝi Leda, simbolan nomon el la antikva mitologio. Same el la romantikaj motivoj, karakterizantaj la hungaran vivon — baskulputo, ĉevalo, kamparo, estrara domo — kaj el la motivoj de la kapitalismo — sango kaj oro — li faris simbolojn. Ekde la unuaj tri Ady-poemaroj — *Novaj Poemoj* (1906), *Sango kaj Oro* (1907), *Sur la veturilo de Elio* (1908) — komenciĝas la historio de la moderna hungara literaturo. La lukto de la seksoj en la amo, la kunplektiĝo de la vivo kaj la morto en la mondo, aperanta sub la egido de Sango kaj Oro, la sorto de geniulo kun Mesia destino — jen la motivoj de la Ady-poezio, kiuj esprimiĝas pere de simbolaro, kuniganta la simbolajn elementojn de praegaj kaj modernegaj mitologioj.

En la lastaj jaroj de la mallonga vivo de Ady la poeta kosmo, en la unuaj verkoj jam parte montrita, fariĝis pli ampleksa kaj profunda. En la poem-volumoj aperantaj ekde 1909 — *Mi Volus Esti Amata* (1909), *Poemoj de Ĉiuj-Sekretoj (1910), La Fuĝanta Vivo* (1912), *La Amo de Ni-mem* (1913), *Kiu Min Vidis?* (1914) — aperas la motivoj de la unuaj poemaroj, riĉiĝantaj je novaj elementoj. Ady konstruis siajn volumojn el poemcikloj, kiuj montras parencajn trajtojn kaj karakterizas lian tutan verkaron.

Dum la unua mondmilito la poeto, kontraŭstarante la totalan militon, admonis, priploris la hungararon, la homaron, ekirintan al fatala vojo. La lasta Ady-poemaro, aperinta en la vivo de la poeto, titolita *Ĉe-kape de Mortintoj* (1918) estas la plej alta

Memortabulo sur la domo de Zsigmond Móricz en Leányfalu

pinto de la Ady-verkaro. La sorton de si mem, irantan al la morto, kaj tiun de sia tuta popolo la poeto konfrontis al la metafizikaj potencoj, kaj la tutan forton de sia genio li enbataligis kontraŭ la teruro de la milito.

La kuntempanoj akcentis la parencecon de Ady kun la francaj modernuloj. Dum iom da tempo ankaŭ li konsideris sin simbolisto. Sed tiuj poetoj estis nur liaj spiritaj liberigantoj. La poezio de Endre Ady ne sole tempe estas pli posta ol tiuj de Baudelaire kaj Verlaine, sed ankaŭ celade, motive, rimede.

Spiranta viveco

La plej signifa reprezentanto de la movado de Nyugat krom Ady estis Zsigmond Móricz [Moric] (1879—1942). Li aĝis jam tridek jarojn, kiam aperis lia unua novelo en Nyugat, *Sep Krejceroj*, kiu tuj faris lin tre fama, unu el la gvidaj figuroj de la nova literaturo. Móricz en la komenco de sia kariero (1908—1919) aperis kiel verkisto unuavice de la kampula vivo. Lia romano *El-ora Koto* (1910) montras la mondon de la vilaĝo baraktanta pro la sufoko de la grandbieno, el kiu leviĝas figuro de la herookampulo, Daniĉjo Turi, kreskinta superhoma. La romano surhavanta multajn trajtojn de la naturalismo, malgraŭ la pligrandigoj estas grandsignifa verko, ĉar anstataŭ la idilia kampul-bildo, idealigita starigas montradon de la sufokanta realo. La protagonisto de *Torĉo,* aperinta en 1917 estas juna pastoro kalvinana, kiu kun grandaj planoj alvenas la vilaĝon. Li volas esti gvidanto de la popolo, sed renkontante la malevoluintecon, la egoismon, finfine kutimiĝas al la „moŝta societo". La romanojn de Móricz en tiuj jaroj akompanis liaj eminentaj noveloj. Lia merito estas, ke aperis la formo de la moderna novelo hungara, konciza, densigita, kun frapa fino.

Post la malvenko de la Hungarlanda Konsilia Respubliko la blanka teroro persekutis la tutlande konatan verkiston, kiu en 1919 en riportaĵoj informis pri la revolucio en la vilaĝoj, pri la agrodivido kaj la kooperado. Dum certa tempo liaj verkoj povis aperi nur en Nyugat. En 1920 li verkis sian kortuŝe belan romanon *Estu Ĝismorte Bona.* En la sorto de lia heroo, vilaĝa knabeto, lernanta en provinca gimnazio, li montris sin mem: la propran sopiron pri la puro, bono. En la trilogio *Transilvanio* verkita inter 1922 kaj 1939, li montris kvazaŭ grandiozan historian pentraĵon de la princlando Transilvanio el la 17-a jarcento.

En la alia parto de la Móricznoveloj kaj en la romanoj aperas vivo de la samtempaj hungaraj „ĝentrioj" (nobeloj), definitive mortkondamnitaj. La *Ĝis Krepusko Aurora* (1926) estas historio de unusola traamuzita nokto. La *Moŝta Distro* (1928) denove montras tragedion de homo, volanta ion pli bonan, kiun la cirkonstancoj retiras kaj finfine faras indiferenta. La *Parencoj* (1930—1932) gvidas la leganton al hungara eturbo, sufokiĝanta pro la monda krizo ekonomia. Ĝia protagonisto estas la urba ĉefprokuroro, en kiu vivas ideoj pri sociaj reformoj, sed li koruptiĝas kaj alvenas la finan alternativon: ĉu fariĝi lupo inter la lupoj aŭ morti. Originala, grandioza eksperimento de Móricz estas la romano *Feliĉulo* (1932—1935). En ĝi malriĉa kampulo rakontas sian vivon, la neelteneblajn humiligojn, la ĉiam renoviĝantan lukton porekzistan. La lasta granda verko de Zsigmond Móricz estas *Sándor Rózsa* (1941—1942). Ĝia ĝenro estas inter la epopeo kaj la romano, historia kaj beletra literaturo. La verkisto vidigas la eventojn de la revolucia liberbatalo de 1848—1849 desube, per la okuloj de la kampularo. La malmiskomprenebla direndo de la romano, postulado de kampula revolucio ĝuste en la faŝisma erao estis ribeliga kaj konsciiga.

La statuo de Endre Ady en Budapeŝto, sur la placo Liszt Ferenc

Zsigmond Móricz komprenis, ke la ĉefa kialo de la vundoj de la hungara socio, tiu de la homaj suferoj kaj de rompoj de la sortoj estas pluvivo de la duonfeŭdismo. Li komprenis, ke en tiu „terura" marĉo, kie ĉio estas implikita, oni devas eksplodigi. Li sciis: se la hungararo ne vekiĝas, ĝi foriĝos el la historio.

Móricz serĉis novajn vojojn de la realismo. La viveco de liaj verkoj estas unika. Eble nur bildoj de Petőfi estas tiel palpeble senteblaj: li surpaperigis la realon kun ĝia „spiranta" viveco.

El la hungara: *R. P. A.*

Intervjuo kun profesoro Waringhien

Profesoro Gaston Waringhien ne bezonas prezenton — lia nomo estas konata eĉ por komencantaj esperantistoj, ja dum pli ol jardeko li prezidis la Akademion de Esperanto, kaj riĉigis nian lingvon per la — eble plej grava — libro de la lastaj jardekoj: Plena Ilustrita Vortaro. La suba intervjuo ne estas tute nova, ĝi okazis dum la pasintjara UK en Lucerno; ĝia apero prokrastiĝis pro la fakto, ke profesoro Waringhien ne povis aprobi ĝian tekston pro longa malsanado kaj operacioj.

Vi partoprenas en la Esperanta kulturo jam duonan jarcenton. Tio signifas, ke vi plej bone konas inter la nuntempaj esperantistoj tiun kulturon per la propraj spertoj. Utiligante tiujn spertojn, donu al ni superrigardon, pritaksadon pri la nuna Esperanta kulturo.

Tiu demando estas tre vasta kaj komplika. Kvankam mi partoprenas en la Esperanto-movado jam delonge, mi ne povas pretendi specialan kompetentecon pri ĉiuj ĝiaj fakoj. Nu, ŝajnas al mi, ke la progreso de nia kulturmovado estas duflanka. Unu flanko estas tre kontentiga, tio estas la aktiva flanko de la aŭtoroj. Ĉar pli kaj pli, post la dua mondmilito kaj la provizora malapero de la Budapeŝta Skolo, oni povis timi pri malprogreso de la afero, sed tre feliĉe iom post iom oni sentis, ke la ĉefaj verkistoj pli kaj pli emas produkti kaj utiligi sian lingvan kompetentecon en la plej diversaj kampoj. Sed la dua flanko estas malpli kontentiga: ĝi estas la sinteno de la ĝenerala publiko. Ofte, kiam mi vizitas libroservojn de la UK-oj, mi memoras tiun anekdoton pri virino, volanta donaci libron al la edzo, kaj petante konsilon de amikino, la amikino diras: „Jam li havas unu." Kaj tio ŝajnas al mi ofte la okazo en niaj esperantistaj rondoj. Tio havas tamen klarigojn, kaj estas komprenebla ĝis certa grado, tiel longe, dum la kursoj de Esperanto ne estos plenumataj de kompetentaj pedagogoj ktp., kiuj povus fari progresigajn kursojn pri literaturo. Esperantistoj ofte ne scias, kion enhavas libro, romano, poezia kolekto, kaj ili hezitas aĉeti ĝin, ĉar ili timas, ke ili tediĝos, legante tiajn aferojn. Sed mi volas insisti pri la granda disvolviĝo de la aŭtora entreprenemo, pri ĉiuj rimedoj de la literatura esprimo. Ekzemple, longaj romanoj estis apenaŭ tolereblaj legaĵoj en Esperanto, sed lastatempe ni havis verajn ĉefverkojn — ni ne timu la vorton — ekz. *La Granda Kaldrono* de Francis, *Kiel Akvo de l' Rivero* de Schwartz kaj aliajn... Mi kredas, ke ni povos baldaŭ havi romanverkistojn, kiuj rangegaliĝos kun verkistoj en multaj malgrandaj landoj. Pri la poezio ankaŭ estas tre diversaj skoloj kaj esprimmanieroj, sed ĉie mi vidas tre bonajn poetojn en plena florado. Vivas samtempe la plej modernisma poezio kaj la klasika spirito. Auld plej aŭdace post la dua mondmilito esprimis sin per revolucia stilo, kaj nun li ne timas alfronti tradukon de plej malfacilaj klasikaj verkoj, kiel Don Johano. Estas tre multaj poetoj ankoraŭ: Conterno, Tárkony, kiu lasta jam verkis en la intermilita periodo, sed kies poemaro povis aperi nur pli malfrue. Pri li oni ankoraŭ ne faris justan takson, ĉar, laŭ mia opinio, lia libro estas unu el la plej elstaraj tutaĵoj de la Esperanta poezio, kreiva en la plej diversaj branĉoj de la poezio. Sed estas ankoraŭ multaj aliaj, Edwin de Kock, Ragnarsson, ktp. —pardonu min la ne cititaj! — ĝis tiu juna ikonoklasto R. Passos Nogueira... Se mi kompares la Esperantan kulturon de la intermilita periodo kun la nuna, mi devas diri, ke la progreso ĉe la flanko de la publiko ne estas tre evidenta. Estas tamen diferencoj: en Orienta Eŭropo la disvendado de kulturaj libroj estas multe pli grava, ol en Okcidenta Eŭropo. Mi opinias, ke oni sentas pli bone la disvolviĝon de la Esperanta kulturo en Orient-Eŭropaj landoj, ol en Francujo, Hispanujo aŭ eĉ Britujo.

Niaj spertoj subtenas tion: nur dum du jaroj kaj iom ni disvendis preskaŭ 2000 ekz. de Kvaropo, praktike nur en Orienta Eŭropo. Kio povas esti la kaŭzo de tiu diferenco inter la du regionoj de Eŭropo? Ja se oni ekzamenas la materialajn kondiĉojn, estas evidente, ke okcidentaj landoj estas pli riĉaj, la homoj tie havas pli da libere disponeblaj, t.e. elspezeblaj rimedoj. Laŭ tio ĝuste okcidentaj teritorioj devus esti la pli intensaj kulturkonsumantoj, ĉu ne?

Jes, sed la afero estas malsimpla. Ĉar prave vi diras, ke okcidentaj landoj estas pli riĉaj, sed ja temas ĝuste pri tio, kion oni nomas embaraso de riĉeco, kaj efektive ordinara franco preferus aĉeti aŭ legi franclingvan romanon, ol Esperantan romanon. Ĉar li — almenaŭ subkonscie — opiniis ke lia lingvo, lia kulturo estas super ĉiuj aliaj. Tiajn naciismajn fenomenojn oni povas malaprobi, sed oni ne povas ignori ilin. La samo ekzistas ankaŭ pri angloj kaj aliaj... Tio verŝajne ekzistas ankaŭ en Orienta Eŭropo, sed la fakto, ke Esperantaj libroj multe

pli facile vendiĝas en tiuj landoj, ŝajnas indiki pli grandan soifon al ne-propra, internacia kulturo. Tiun fenomenon de Orienta Eŭropo mi ne povas klarigi, tamen la pli rapida vendiĝo de libroj estas fakto. Mi memoras, ke en la unuaj jaroj post la milito, en 1946 aŭ simile, mi vizitis Kalocsay. Kaj li montris al mi en librejo hungaran tradukon de Homero. Li diris, ke oni eldonis 5000 ekz., kaj post unu semajno la eldono elĉerpiĝis ...

Nu, Homero nuntempe ĉiujare eldoniĝas en ĉ. 50 000 ekz., kaj la libro kostas ne pli ol skatolo da cigaredoj ...

Jes, eble ankaŭ la prezoj influas la pli rapidan vendiĝon de Esperantaj libroj en Orienta Eŭropo ...

Mi devas rimarki, ke la prezo de Esperantaj libroj estas relative alta: prezo de Kvaropo egalis ĉe la apero ĉ. 4—5 horan laboron de persono kun mezaj enspezoj; kaj samampleksan hungarlingvan libron oni povas aĉeti jam por ĉ. la sesono de la prezo de Kvaropo. Tamen troviĝis klientoj por tiu poemlibro, kiu ĉetere teknike estis iom malbela ... Kaj tio miaopinie ŝuldiĝas al la granda socia prestiĝo, kiun literaturo kaj arto havas en Orienta Eŭropo.

Tio ankaŭ povas esti unu el la klarigoj je tiu soifo por Esperantaj libroj. Ĉiukaze ĝi estas tre laŭdinda kaj forte kontribuas al la progreso de la Esperanta kuturo.

Kaj jen mia demando. Ĉu Esperanto en la nuna formo taŭgas por vere uziĝi en ĉiuj kampoj de la vivo? Kiel opinias pri tio nia plej granda leksikografo?

Ni ne troigu ... Unu el la leksikografoj de Esperanto. Ankaŭ sur tiu kampo oni devas fari diferencojn. La ĝenerala kaj literatura lingvo estas progresinta, kaj nun ĝi kontentige povas fronti ĉiujn uzojn kaj ĉiujn problemojn en internaciaj medioj. Pri la fakaj, teknikaj kampoj ni devas agnoski, ke mankas ankoraŭ al ni bonaj fundamentaj terminaroj. Eble la jurista terminaro ne estas sufiĉe ampleksa, difinita, kaj mankas ankaŭ unuecigo de konceptoj, ja en iuj landoj oni baziĝas sur la romiana kodo, en aliaj sur la slava. Ja ofte similaj terminoj havas tre malsamajn signifojn. Tion oni povas solvi nur per internacia kunlaborado. Pri la pli teknikaj kampoj mi eĉ ne volas paroli ... kvankam ni faris kontentigajn provojn de fiksado de terminologio, precipe la germanoj, pri elektrotekniko, kalkulmaŝinoj ktp., sed ili ne estas ankoraŭ sufiĉe internacie uzataj. Kaj estas terenoj, kiel ekz. aviado, kie ne ekzistas eĉ provo de terminologio ... Dum iu kongreso oni proponis, ke oni agadu por uzigi Esperanton en la aviado. Sed unue ni devos havi nian lingvon taŭga por tio. Do, sur la teknikaj kampoj restas ankoraŭ tre multe por fari. Sed nia lingvo estas tute taŭga por ellabori tiujn terminologiojn. Mi devas mencii ĉi tie la tre kuraĝan entreprenon de Eichholz, kiu estas direktoro de la Terminologia Centro de la Slipara Vortaro, kaj li ĝisdatigas konstante siajn slipojn, ĝis la apero de teknika vortaro.

Antaŭ kelkaj jaroj elstara hungara politikisto esprimis siajn dubojn pri la uzebleco de Esperanto en teknikaj kampoj, argumentante, ke tekniko evoluas en nacia medio — plejparte en kelkaj lingvoj — kaj ankaŭ la terminologio kreiĝas en tiuj lingvoj, do Esperanto ĉiam povos postlami la aktualecon. Ĉu vi povus kontesti lian argumentadon?

Tio ŝajnas al mi erara rezono, en kiu oni intermiksas la eksteran formon de lingvo, t.e. la vortojn kun la esenca mem strukturo kaj esprimpovo de lingvo. Kompreneble, la individuoj, kiuj inventas ion, donas al tio nomon el sia propra lingvo, kaj la ceteraj nacioj alprenas, depruntas la nomon kune kun la inventaĵo. Tio ekzistis en ĉiuj tempoj, kaj neniam estis kaŭzo de malfortiĝo aŭ de malŝato por iu ajn lingvo: la germanaj poetoj ne estas malpli grandaj, ĉar ili nomas sin el latina radiko *(dictare — Dichter)*, nek la hungaraj sportistoj malpli fortaj, ĉar ili uzas la anglan vorton *meccs* por siaj matĉoj. Ĉiu lingvo kaptas sian utilaĵon tie, kie ĝi troviĝas, kaj pro tio oni ne akuzas ĝin je postlameco.

Kiel vi opinias pri la kontribuo de hungaroj al la internacia kulturo de Esperanto en la intermilita tempo, kaj kiel pri la nuna stato? Ĉu vi estas informita pri la libroeldona aktivado de Hungara Esperanto-Asocio?

Mi estis tro miksita kun la agado de Kalocsay, Tárkony kaj aliaj brilaj hungaraj esperantistoj, por formuli senpartian juĝon pri la rolo de via nacio inter la du militoj. Mi diru nur, ke mi konstatas, ke via lando estis kaj restas plu unu el la ĉefaj kolonoj de la kulturo en nia movado, kaj ke mi treege ĝojis, kiam min atingis la sciigoj pri la reaktiviĝo de vialanda libroeldonado; se ĝi povus kunlabori kun la samdirektaj entreprenoj en la diversaj socialismaj landoj, tio estus tre potenca apogo al nia Esperanta movado, kaj tia interŝanĝo de Esperantaj libroj povus nur riĉigi la kulturon de ĉiu el la partoprenantaj nacioj. Ŝajnas al mi, ke, almenaŭ sur tia limigita tereno, tia dezirespriimo ne estas tute ĥimera.

Profesoro Waringhien, dankon pro la intervjuo.

Vilmos *Benczik*

Gravaj helpantoj
de la Esperanto-movado
estas BILDKARTOJ

Por konigi la pejzaĝojn, urbojn,
arton de nia lando,
por profundigi la amikecon
kun viaj korespondantoj
la plej bona rimedo ĉiam estas
— bildkartoj.

Por ordigi, ampleksigi
vian kolektaĵon de bildkartoj
volonte donas konsilojn
Képzőművészeti Alap Kiadóvállalata
(Eldonejo de la Belarta Fondaĵo)
(1366 Budapest, 5. Pf. 110.

Ják. Abateja preĝejo de Benediktanoj

Hortobágy. Cevalpaŝtisto

Simboloj de la hungara reĝa potenco



PRI STRANGA PENTRISTO

„Strangeco" estas estetika kategorio, jam depost jarcentoj konata, uzata en ĉiuj branĉoj de la arto. Mi menciu nur la nomojn de du mondfamaj nederlandanoj: Hyeronimus Bosch kaj Pieter Brueghel. Sur iliaj pentraĵoj ni povas vidi eksterordinarajn estaĵojn, duone homojn, duone bestojn, kiuj vivas nenie sur la Tero, kreis ilin nur la fantazio. Tamen, kiuj ne scials, kiel terura epoko estis la 16-a jarcento por nederlandanoj sub la hispana jugo, por tiuj restas la bildoj de Bosch kaj Brueghel kuriozaĵo aŭ mistika apokalipso.

„Strangeco" nuntempe ludas ĉefrolon ne nur sur la diversaj terenoj de la modo, sed ankaŭ en la artoj. Dum la lasta aŭtuno en Budapeŝto oni aranĝis ekspozicion de Gábor Dienes. Ĝi estis vera sensacio, dum kelkaj tagoj oni aĉetis ĉiujn bildojn, tagĵurnaloj kaj revuoj unuanime aklamis la talenton de Dienes. Kial?

Tial, ĉar la juna artisto (naskita en 1948) tuj per la unuaj verkoj (en 1973—74) montriĝis majstro de linioj, koloroj, konstruado kaj — imago. Li pentras homojn, bestojn, hombestojn, kun kiuj ni renkontiĝis nenie, tamen ili estas iel konataj, akcepteblaj estaĵoj, loĝantoj de la „Dienes-lando". Ĉi tie, la nigre-blankaj reproduktaĵoj sen gravaj koloroj, nur parte kapablas prezenti la originalan talenton, la magnetan specialecon de la Dienes-verkoj.

Ĉu vivas ie ĉi tiuj homoj *(Tablo-societo)*? En kiu lando, kontinento? Kaj ekzistas la groteska hundo, kiu sidas antaŭ sia mastro *(Homo kaj hundo)*? Ne, ili ekzistas nenie, ja ili ne havas manojn, piedojn, ili estas kvazaŭ rudimentaĵoj, la kostumo kaj ĉapelo de la homo devenas eble el la mezepoko aŭ el iu tre malproksima planedo. Kaj tamen: ni ĝojas sincere, ĉar en la maro de la nuntempaj abstraktaj pentraĵoj, grafikaĵoj, skulptaĵoj malofte ni povas halti antaŭ bildoj, kiuj montras figurojn, kiuj similas iom la estaĵojn de la terglobo.

Sendube: la kreaĵoj de Dienes estas niaj konatoj, ĉar ili vivas ne nur per siaj formoj, sed ili havas esprimplenajn gestojn, karaktertrajtojn, kaj la tuto de la bildoj radias riĉan sugestion, fortan atmosferon. Laŭ mia opinio tiu ĉi atmosfero estas la plej ĉefa specifaĵo de Dienes. Lia vidmaniero estas nekutima, liaj figuroj estas unikaj en la nuna hungara pentroarto.

La plenumaĵo de la juna majstro estas konvinka pruvaĵo: en la arto oni povas fari ĉion — se la rezulto estas suverena, originala, talentoplena. Sen tiuj virtoj restas ĉio nur eksperimento, ludado, arlekena spektaklo, iluziista artifiko, moderna modo.

Mihály *Gergely*

Gábor Dienes: Tablosocieto

Homo kaj hundo



PANORAM

Salono en la fortikaj-muzeo de Tata kun skulptajoj, reliefoj, sarkofagoj el la romia epoko

Nova muzeo en Tata

Jam finiĝis la renovigado de la mezepoka fortikajo de Tata kaj de la ĝin ĉirkaŭanta iama fortikajkomplekso. En la fortikajo estas establita muzeo parte el la riĉa materialo de la ĉirkauajo. La elfosado dauras plu kaj ĝia lasta rezulto estas la malkovro de tombejo de la 11-a jarcento. Orelpendajoj, hararringoj kaj moneroj el la epoko de la dinastio Árpád estis trovitaj en la tomboj kaj interesa, malfermebla relikvujo. La tombejo estis uzita ĝis la 15-a jarcento, ĝis la komenco de la bataloj kontrau la turkoj.

Jubileo de agrikultura lernejo

Antaŭ 200 jaroj estis malfermita la Agrikultura Faklernejo en Szarvas (urbeto en la sudorienta parto de Hungario, proksime al Gyula). La jubilean jaron oni komencis per internacia agrikultura konsultiĝo en kies kadro oni rememoris pri Sámuel Tessedik, luterana pastoro, scienca evoluiganto de la agrikulturo, fondinto de la unua agrikultura faklernejo de Hungario. Dum duonjarcento ekzemplodone li luktadis per instruado kaj propraj eksperimentoj por la plibonigo de la kamparana vivo.

Sámuel Tessedik (1742—1820)
(grafikaĵo de András Csanádi)



Ambasadoro

Multaj hungaraj esperantistoj jam bone konas la delikatan figuron kaj la ĉiam ridetantan

Cizuko Tadaiŝi

Per hungaraj manetoj preti

PANORAMO

de la paco

vizaĝon de la ĉarma japanino Čizuko Tadaiŝi, kiu sep monatojn pasigis ĉe Budapeŝta esperantista familio de septembro 1979. Dum tiu tempo ŝi vizitis krom la internaciajn aranĝaĵojn, kiel VEF (Vintra Esperanto-Ferio) en Budapeŝto kaj SIA (Semajno de Internacia Amikeco) en Pécs, ankaŭ plurajn Esperanto-grupojn en provincaj urboj; Boly, Mohács, Hódmezővásárhely kaj instruhorojn de Géza Kurucz en Kecskemét, de Éva Farkas en Budapeŝto kaj prelegojn de Dr-o István Szerdahelyi en la Budapeŝta Universitato Eötvös Loránd. Fraŭlino Čizuko Tadaiŝi havis ankaŭ specialan programon, kiun ŝi volonte prezentis al geamikoj: tiu estis la fama japana te-ceremonio, kies diplomita instruistino ŝi estas. Multaj gastoj povis ĝui en Debrecen, Kecskemét, Hódmezővásárhely, Szentendre kaj nature ankaŭ en Budapeŝto la delikatajn movojn de la praa rito kaj ankaŭ la specialan verdan „ceremonian" teon, kiun la afable ridetanta fraŭlino en festa kimono transdonis aparte ekgenuante antaŭ siajn gastojn.

La malfermitan infanecan koron de la ĉarma japanino tuj rekonis ankaŭ la infanoj. En pluraj grupoj de infanoj ŝi prezentis kaj instruis kiel faldi el papero kolombojn, pilkojn, rakedojn kaj memkompreneble la sanktajn gruojn, simbolojn de bondeziroj, sano kaj feliĉo.

Kie ajn ŝi parolis inter esperantistoj, kiel ora fadeno ekbrilis la ĉefa direndo: „la celo de mia vivo estas veki pacemon kaj semi fratan konfidon per la helpo de Esperanto".

panaj gruoj

Protektado de maloftaj birdoj

La *Administra Komitato* de *Bakony* en kunlaboro kun la *Naturscienca Muzeo de urbo Zirc* plifortigis sian agadon por protektadi la birdojn en la arbaroj de montaro Bakony, norde de Balatono. Specialan defendadon oni certigas por 64 specioj de birdoj, kiuj nestas en Bakony kaj el kiuj kelkajn jam minacas formorto. En la ĉirkaŭaĵo de Zirc kaj de la apudaj vilaĝoj oni kreis birdodefendan modelterenon kaj lokigis plurcentojn da ligno-ujetoj por la birdoj.

Gelernejanoj de la gimnazio *Antal Reguly* en Zirc fervore

Eĉ en la plej densa arbaro troviĝas artefaritaj „kavernoj" en sendanĝera loko

Centojn da memfaritaj ujetoj lokigas la gelernantoj por la birdoj

partoprenas en la birdo-protektado. Dum, la longa vintro ili zorgis pri provizado de la „birdo-manĝejoj" per oleaj grajnoj.

Fervojistoj alfrontas lingvojn

La direkcio de la Hungara Ŝtata Fervojo en Pécs senpagajn lingvokursojn organizas por fervojistoj de suda Transdanubio.

Serbo-kroataj kursoj estas en Pécs, Magyarbóly kaj Murakeresztúr, germanaj kursoj en Fonyód kaj Balatonszentgyörgy, krome oni lernas en pluraj lokoj italan kaj rusan lingvojn. La direkcio instigas la fervojistojn per premioj por la sukcesaj ekzamenoj.

La Kooperativo „Interhelpo" ĉe piedoj de la montaro Tjenŝano

„Fine post dudek sep tagojn longa, laciga vojaĝo, la 24-an de aprilo en la jaro 1925 ni feliĉe atingis stacidomon de urbo Piŝpek. Laŭ vortoj de la fervojistoj ni komprenis, ke ni estas ĉe la lasta stacidomo de Nord—Kirgizio. Eĉ la reloj estis instalitaj nur antaŭ kelkaj jaroj. Ŝerce ni rimarkis: jen, ĉi tie do estas la fino de l' mondo."

Ĉi suprajn liniojn ni citis el rave interesa libro, el „Internaciistoj en Kirgizio", verkita de la 82-jara János Szabó. La libro starigas monumenton por antaŭ-duonjarcenta internaciisma entrepreno: por la fondo, luktoplena disvolviĝo kaj sukceso de la Kooperativo „Interhelpo". Tiu kooperativo ekestis laŭ iniciato de diverslingvaj Ĉehoslovakiaj komunistaj esperantistoj, kiuj decidis transloĝiĝi en Sovetunion kaj tie helpi la landon luktantan kontraŭ restaĵoj de la carismo.

Naskiĝo de spontanea „Esperanto"

Varbitaj el inter la filoj de kvin Ĉehoslovakiaj nacioj, la specialistoj kun siaj familianoj transloĝiĝis plurmil kilometrojn for de sia patrujo, en ĉirkaŭaĵon de la montaro Tjenŝano, al tero de jurtoj, metiistoj kaj analfabetismo, kaj ili plenumis tie grandioze heroan aferon: kreis industrion, tiutempe modernan. — Ankaŭ lingvon, kiun nek antaŭ ili, nek post ili praktikis homidoj. Ili nomis ĝin lingvo „Interhelpo", sed rajte ni nomus ĝin spontanea „Esperanto".

Antaŭ la forveturo ili pensis, ke la internacia lingvo Esperanto estos la komuna lingvo en la nova patrio, ja kelkaj el ili jam konis ĝin. Tiutempe, en la dua jaro de ilia restado en Sovetunio, sovetaj esperantistoj aranĝis kongreson de SAT, kiun kongreson salutis ankaŭ Lunaĉarskij, popolkomisaro pri klerigado. La kongreso kompreneble primemoris ankaŭ ilin, la famo pri tiu kooperativo baldaŭ disiris en la mondo, pluraj delegacioj alvenis por studi tiun heroan entreprenon. Vizitis ilin ankaŭ Julius Fuĉik, la fama verkisto, poste nacia heroo de Ĉehoslovakio, kiu volis verki romanon pri la vivo de la Kooperativo.

Komunumo de dek tri nacioj

La kooperativo havis tiom da zorgoj kaj laboro, devis venki tiom da malfacilaĵoj, ke eĉ pripensi estas malfacile. La interhelpanoj en Piŝpek — en la posta urbo Frunze — devis ĉion krei por si mem, ne restis do por ili tempo kaj energio lerni Esperanton. Tamen, ili bezonis komunan lingvon, kaj tiun celis la spontanea „Esperanto", kreita far ili. En la lingvo krom la plej bezonataj, bazaj esperantlingvaj esprimoj miksiĝis vortoj de la kvin mezeŭropaj popoloj kun tiuj de kirgizoj, uzbekoj, rusoj, ukrainoj, ujguroj, taĝikoj kaj tataroj. Post transdono de la unuaj uzinoj kaj fabrikoj, la laboristoj estis varbitaj el inter la enloĝantoj, tiel baldaŭ dektri nacioj konsistigis la kooperativon, inter ili ankaŭ ĉinoj kaj judoj.

Kvankam la lokaj politikaj kaj administraj organizoj lasis la kooperativanojn libere elekti, per kiu lingvo ili volas unuecigi kaj perfektigi la ĉiutagajn kontaktojn, kaj en kiu lingvo ili volas eduki la infanojn — la elekto ne estis facila, tamen, la rusan, kiel lingvon de ilia socia ĉirkaŭaĵo ili devis ĉiam pli konsideri.

En la kolonio de Interhelpo 4—5 jarojn post la alveno krom la gepatra lingvo ĉiu parolis en certa nivelo la rusan, ankaŭ la interhelpan lingvon. Poste tiu ĉi lasta tute velkis.

„Paradizon ni kreis tie"

Dek du sage rektaj stratoj. Sur la ĉefstrato vico de pomarboj kaj pirarboj. Apud la ĝardenaj fruktarbejoj altaj poploj. „Paradizon ni kreis tie..." — memoras János Szabó. Brilas la okuloj ankaŭ de lia edzino, kiu per grizharara kapo kapjesas pri la malproksima miraklo, kaj ankaŭ ŝi ripetas: — Paradizon! Ŝi havis tiutempe dudek jarojn, laboris en teksfabriko de Interhelpo. Kaj ŝi naskis tri gefilojn en Kirgizio.

Kio troviĝis en tiu, far ili permane, ŝton' al ŝtono konstruita mondo? Konstruis ili tegol- kaj brikfabrikon, fergisejon, vestaĵ- kaj meblofabrikon... La biblioteko de la kooperativo estis preskaŭ same ampleksa, kiel tiu de la urbo Frunze, kaj en ĝi ĉiu povis trovi la bazajn literaturajn verkojn de sia gepatra lingvo. Ilia lernejo havis naŭ klasĉambrojn. De la infanĝardeno kaj infanvartejo ili ne ŝparis la belon, kolorojn kaj harmonion.

La klubon ili aranĝis alloge kaj komforte por mil personoj. Ili konstruis parkon por ripozo kaj kulturo, ankaŭ kinejon...

— Tia do estis ĉe piedoj de Tjenŝano tiu permane kej elkore kreita internacia Paradizo.

Memortabulo pri heroaĵoj

La interhelpanojn post plenumo de sia memvole akceptata misio disen ĵetis la sorto. János Szabó kun sia familio en 1950 repatriiĝis, por hejme utiligi la multjarajn spertojn. Post forpaso de jardeko ili denove vizitis Kirgizion, por rigardi: kio ŝanĝiĝis, kiel vivas la tie restintoj, por kune primemori pasinton kun la ankoraŭ atingeblaj membroj de la iama „familio".

Sur la loko de la kooperativo nun staras maŝinfabriko, laboriganta sesmil laboristojn. Kie estis la ĝardeno de familio Szabó, nun situas la ekspozicio pri popolekonomio de la respubliko.

Sed memortabuloj heroldas ĉie: Interhelpo estis realo, la interhelpanoj plenumis verajn heroaĵojn de la ĉiutagoj.

Kuzino de sinjorino Szabó nun en Frunze laboras kiel okulkuracisto, ŝia filo vivas en Leningrado. Fiere ŝi montras fotojn de la genepoj: „Ankaŭ ili estas gefiloj de Interhelpo." Kvankam la kooperativo ĉesis, ĝia memoro vivas plu, neekstermeble.

Kaj ĉu la lingvo „interhelpo"? — Ĝin naskis provizora neceso, kaj kiam la kolektivo jam bezonis la ĉiuterene prilaboritan, evoluintan komunan lingvon — ĝi farigis nesufiĉe taŭga. Kaj ĉar la lingvo de ilia socia ĉirkaŭaĵo estis la rusa, post kelkaj jaroj la kooperativanoj ĝin elektis por komunikado.

Ja ilia nova patrio estis soveta tero. Naskiĝloko de iliaj gefiloj estis soveta urbo.

Iréne *Szabó*

Trad.: M. F.

REVUO DE REVUOJ

Sciencaj temoj tie kaj alie! feliĉe ili plimultiĝas en E-revuoj, kaj tio estas en nia moderna epoko forte salutinda tendenco. Kiam mi legis en HEROLDO la artikolon pri la „miljara" *Avicena* (Ibn Sino), publikitan de Petro *Poliŝĉuk* (ĉu ni kredu lian 70-jariĝon?) en mia kapo turniĝis demando: ĉu nia tendaro konas, almenaŭ iomete, ke la Eŭropa scienco ne staris ĉiam supre? Ke dum la frua mezepoko la sciencoj multe pli prosperis en Meza Azio ol en Eŭropo? Ke ĝuste en la nuna *Uzbekistano* — Buĥara, Samarkand ties ĉeflokoj — gravegaj sciencaj kaj beletraj skoloj ekzistis? Ke libroj, tezoj de tieaj admirindaj scienculoj de matematiko, astronomio estis instruataj, iliaj tabeloj uzataj en la plej malnovaj universitatoj de Eŭropo — en Bolonjo, Parizo, k. a. Sed la ĉefaj komerclinioj alilokiĝis poste al la oceanoj pro la geografiaj malkovroj; ekfloris la scienco en Eŭropo, kiam pro la sama kaŭzo la Mez-Azia kulturo stagnadis. La Eŭropa scienco pli poste definitive superis, sekve de la Anglia industria revolucio.

La Eŭrop-centrulojn probable surprizos, ke la„arabaj" (kompreni: Mez-Aziaj) verkoj nur fine de la 17a jc. malaperis el la Eŭropa universitata instruado! Inter tiuj estis la siatempe fundamenta medicina verko de Avicena, kiu el Buĥara kontribuis al pluraj sciencoj, al la materiisma filozofio. En epoko de la koloniado ekregis ia Eŭrop-centrismo kaj fiero, kaj forvišiĝis el la publika memoro la iama „dua loko"...

Pri filozofiaj rilatoj de la astronomio okupiĝis bone kompreneblaj artikoloj en HOMO KAJ KOSMO. La „spiritajn okulojn" de la homaro revolucie malfermis epokfaraj malkovroj de la (nur!) duonjarcenta *radio-astronomio.* Plene forvaporiĝis la praa centrisma imago de la homaro pri la Universo — iam la Tero en la centro, poste la Suno —, eĉ nia „Lakta Vojo" kun siaj stelo-miliardoj estas *nur unu* el la cent miliardoj de la galaksioj. Jarmilaj eraroj falis — ilin kontestis jam Kopernik, Kepler, Newton —, bankrotis ankaŭ imagoj pri ia „elektita" homaro. La Kosmon konkeras, pli ĝuste: malkovras, ne la iluzianta homo, sed la praktika, produktanta homo, *kiu neniel rajtas „ludi" per H aŭ N bomboj, kun la sorto de nia planedo...*

Jam antaŭ dudek jaroj pluraj elmontris kiel fekunda esplorkampo estas Eo por la lingvoscienco. Tiel ankaŭ la nun legebla studo de la meritplena prof. *Bokarev* kaj *Ahmanova.* Estas vere bedaŭrinde, ke tiu studo — publikita tra 3 numeroj de PACO — restis ankoraŭ aktuala! Kiom da teorie gravaj lingvosciencaj problemoj estus ekzameneblaj helpe de Eo! Ŝancoj estas tamen: la scienca prefero nuntempe turniĝas al la plej ĝeneralaj regulecoj de la homa lingvo, kiel emfazita komunikilo pri la interrilatoj de homo kaj mondo. La koneksoj de la sukcesinta lingvo Eo al la etnaj lingvoj, Eo kiel lingvo-kristaliĝo, prezentas brilan esplorterenon por malkovri lingvajn specifecojn kaj universalecojn. La nova branĉo, la *interlingvistiko,* ties fakuloj vere diligente klopodas altiri atenton de la lingvistoj. Ili faras tion en atmosfero, kie ankoraŭ regas ignorado de Eo, kvankam tio estas — laŭ eldiro de ekstermovada lingvoscienculo — skandalo en la lingvosienco, raportas DER ESPERANTIST pri grandsukcesa scienca konferenco en GDR.

Sed finfine, kio do kaŭzas la neglektemon de lingvosciencistoj rilate E-on? Al tiu problemo tre interese, per freŝaj ideoj proksimiĝis en ESPERANTO la hindia Probal *Daŝgupto,* kiu faris jarcentan superrigardon. Li trovis, ke la lingvoscienco, samtiel la ĉefaj skoloj, paralele akompanis la historiajn strebojn de la okcidentaj koloniaj imperioj. Tial ilian intereson altiris aliaj fenomenoj ol tiuj en Eo, — malfeliĉa hazardo el E-a vidpunkto.

Ĉu Eo estas tro Eŭropeca? W. *Schmid* konkludis en LA REVUO ORIENTA kaj EĤO, ke malgraŭ gramatikaj „fremdaĵoj" (artikolo, pluralo) ne troviĝas konkuranto de Eo je facileco: ĝi estas la plej facila Azia kaj Afrika lingvo! Por la Tria Mondo dediĉis numeron KONTAKTO: legindaj sciigoj viciĝis pri *kultura imperiismo,* pri tradiciaj regadmanieroj (indianoj). Elstaras la fina artikolo pri la virina egaliĝo, prudente analizante oftajn simptomojn inter geviroj.

Kultura imperiismo vipas ankaŭ en Eŭropo. LA ESPERO nomas *konsumsveda* en fulme kolera artikolo la angle-svede miksitan lingvaĉon, publikante longan liston de ĉ. 200 terurigaj misnomoj de mod -varoj, vendejoj k. s. Paralele legu en INTERNACIISTO pri simila *„engledeŭĉ",* kaj avertas pri la misiĝanta lingvosento por la gepatra lingvo. Kompreneble ekzistas jam *„hungliŝ"* inter snoboj hungaraj, ankaŭ en varoreklamoj. IL per si mem defendas la naciajn lingvojn!

Pri sia vere ekzemplodona *esperantista testamento* informis d-ro H. *Maŝler* en ISRAELA E-ISTO. Li heredigas 20 mil guldenojn al UEA kaj jaran renton al ELI, por utiligi ĝin favore de Eo. Li sugestas por elspezi takte: per altaj premioj por sukcesaj agantoj, kursgvidantoj, eldono de afiŝoj, informiloj, tradukaĵoj, lernolibroj, k.s., vendado de libroj ktp. Honorinda ago de ĉiam entuziasma e-isto, per kiu li faris monumenton pri sia fido kaj fideleco al la Zamenhofa lingvo.

Ervin *Fenyvesi*

Aleksandro Blok (1880-1921)

DEK DU

Nigr' vespera,
Neĝa blank',
Vent' kolera
Ĉiun homon faligas al flank'.

Vent' kolera
Blovas ĉie surtere,
Kirlas leĝere
Neĝon kun kant';
Sube glacio estas sub pland'.
Kun glitrulo
Ĉiu pasant'
Faletas — ho mizerulo!

Sur domoj por impreso
Etendiĝas tra strat'
Sur ŝnurego plakat':
„La tutan potencon al Fonda
Kongreso!"

Maljunulino plore sin ŝovas,
Neniel kompreni povas,

Por kio tia ŝtofpec'
Pendas sen ia bezon'?

Ja al kiom da nudaj knaboj
laŭ dec'
Ĝi sufiĉus por kalson'...
Kiel kokino la maljunino

Apenaŭ la neĝon transiras.

— Ho, ĉiela patronino!

— Ho, bolŝevikoj en tombon
nin tiras!
Vento-skurĝo

En frosto vipas sen halt'!
Kaj sur stratangulo burĝo
Forkaŝis nazon en palt'.

Sed jen — kiu estas? — Longhara
Kun la parolo malklara:

— Perfiduloj!

— Pereo Rusia!

Certe verkisto ia,
Babiladulo...

Kaj jen ĉe flanko vojas
Larĝabaska rob', —
Kial nun malĝojas
Vi, kamarado pop'?

Ja vi iam gravis
En kutima rol',
Sur ventrego havis
Krucon por popol'!

Jen en pelto sinjorino
Alian ekvidis:

— Ni ja ploris, ploris sen fino...

Subite ekglitis
Kaj — ŝmac — sur la neĝon
eksidis!

Hej, he vi!
Helpu ŝin levi!
Gaje sin portas,
Kolere mordas
La venta blovado,
Baskojn tordas,
Pasantojn tiras,
Ĉifas taŭzas kaj ŝiras
La grandan plakaton:

„La tutan potencon al Fonda
Kongreso!"
Kaj vortojn alportas:

...Kaj ĉe ni ankaŭ estis
kunveno...

...Apud ĉi magazeno...
...Ni kunsidis —

Kaj decidis:
Por foj' — dek rublojn, por nokto
— dudek kvin...
...Kaj malpli postulu neniu
knabin'!...

...Prenu min...
Malfrua vespero,
Sur strato iĝas malpleno.
Unu malriĉulo
Iras kun tremo
Sub venta kolero.

Malfeliĉulo!
Aliru —

Ni interkisiĝos...

Por kia celo?

Panon por mi akiru!
Preteriru!
Nigras, nigras ĉielo,
Kolero, malgaja kolero
En brusto ardu,

Nigra kolero, sankta kolero...

Kamarado, rigardu
Kun severo!

2.

La neĝo flirtas, la vento spiras,
Kaj dek du viroj silente iras.

Rimeno nigras de pafil',
Ĉirkaŭe — lumoj, da lumoj mil'...

Cigaredaĉ' en buŝ' dum pas',

Sur dorso decus karoa as'!*

Libero, libero,

Sen kruco, ha, ha!

Tra-ta-ta!

Malvarmas, kamaradoj,
malvarmas!

— Kaj Joĉjo ja kun Kanjo
restas...

— En ŝia ŝtrumpo mono estas!

— Li estas mem en bona stat'...

— Estis la nia, nun — soldat'!

— Nu, Joĉjo, burĝo, hundinido,

Nur provu ŝi je ĉi perfido!

Libero, libero,

Sen kruco — ha, ha!
Estas ŝi kun Joĉjo nun —
Kion ili faras nun?

Tra-ta-ta!

Ĉirkaŭe lumoj, da lumoj mil'...
Surŝultre pendas la pafil'...

Ni tenu paŝon revolucian!
Atentu malamikon nian!

Pafilon ekprenu, amiko, vi tuj!
Ekpafu ni kuglon al Sankta
Rusuj'!

Al tirana,
Al kabana,
Dikpostaĵa!
Senkruca, ha, ha!

3.

Jen foriris niaj knaboj
En gvardio ruĝa servi,
En gvardio ruĝa servi,
Bravajn kapojn ne konservi!

Hej vi, malfeliĉ-amaro,
Dolĉa vivo nia!

Ĉifonita palto,
Pafilet' aŭstria!

Por ke burĝoj tremu ŝoke
Ni disblovu ĉiuloke
Mondan brulon en la kor' —

Benu nin, ho Disinjor'!

4.

Krias tra la neĝo voĉo,
Flugas jen kun Kanjo Joĉjo —
Kun elektra lanterneto
Sur kaleŝtimono...
Hej, ha, falu vi!

En paltaĉo li soldata,
Kun mieno stulta, sata,
Turnas li lipharojn nigrajn,

Turnetiras,
Ŝercojn diras...

Kiajn Joĉjo havas fortojn!
Kiajn Joĉjo diras vortojn!
Stultulinon Kanjon premas,
Logintrigas ŝin...

Kapon turnis ŝi en tento,
Kiel perloj brilas dentoj...
Ha vi, Kanjo, mia Kanjo,
Dikvizaĝa vi...

5.

Sur la kol' cikatron, Kanjo,
Tute freŝan havas vi;
Kaj sub via mamo, Kanjo,
Estas de gratajo stri'!

Hej, hej, dancu! Havas
Vi piedojn, kiuj ravas!

Frivolece vi paradis
En puntaĵoj, kun ruband';
Triviale malĉastadis
Inter oficira band'!

Hej, hej, nun malĉastu!
Korbatad' ne tiel hastu!

Vi memoras: l' oficiro
ne forkuris de tranĉil'...
Ĉu, ĥoler', pri tiu viro
Vi forgesis kun facil'?

He, he, ne forgesu,
Kun vi dormi do permesu!

En gamaŝoj vi festenis,
Devoritas ĉokolad';
Kun junkraro vi promenis —
Nun eĉ iras kun soldat'?

Hej, peku vi sen tim'!
Pli facilos por anim'!

6.

Kuregas la kaleŝ' denove,
Veturigisto krias bove...

Halt, halt! Andreĉjo, vojon baru!
De poste, Peĉjo, vi ekstaru!...

Veturigist' kun Joĉjo for
ekkuris — pafu kun fervor'!

Trah-tararah! Do estas fin'
.....
al promenad kun fremda in'!...

Forkuris tamen... Ho, fripone!
Nu, ni kvitiĝos morgaŭ bone!

Sed Kanjo? — Trafis mort' subita!
La kapo estas trapafita!

Ĉu, Kanjo, ĝojas vi? — Silento...
Do, kuŝu hunde sen atento!...
Ni paŝon tenu revolucian!
Atentu malamikon nian!

(Daŭrigota)

*) Signo alkudrata sur dorson
de krimuloj.

Tradukis: N. Nekrasov
kaj B. Tornado

La ĉefa frontono de la Kuracbanejo Széchenyi

D-ro Ferenc László

Budapeŝto, urbo de banejoj

IV.

Kuracbanejo Széchenyi

Inter la famaj lokoj de Budapeŝto, la Kuracbanejo Széchenyi[1] okupas eminentan pozicion. Sen ĝi jam neniel estas imagebla la Urba Arbareto, tiu preferata distrejo de la ĉefurbanoj, kvankam ilin atendas tie Zoologia Ĝardeno, la Kastelo de Vajdahunyad, Gaja Parko, vintre eĉ glacikurejo.

La bonfama banejo magnete relogas ĉiujn, kiuj jam ĝuis—gustumis ĝian refreŝigan akvon. Kaj inter ĝiaj gastoj troviĝas el ĉiuj generacioj: volonte vizitas ĝin la junaj kaj la mezaĝaj. Same la emeritoj jam laciĝintaj preferas sidadi dum horoj en la agrabla varma akvo, ŝakludante ĉe la basenrando, bieron trinkante sur la restoracia teraso,

diskutante pri l'aferoj de la mondo. Multaj apartenas jam de jardekoj al la „pragastoj", kiuj gaje salutas aliajn, kiam denove renkontiĝas.

En Budapeŝto unu el la plej frekventataj estas la Banejo Széchenyi. Kaj ne nur nuntempe! Jam antaŭ 70—80 jaroj, estinte ankoraŭ „Banejo Arteza" estis, tiel kvankam tiutempe ĝi situis ankoraŭ ĉe la urborando. De tiam la rapide kreskinta ĉefurbo, jam delonge englutis la tutan Urban Arbareton.

El trafika vidpunkto ĝia situc estas tre konvena: per ĉiaspecaj amasveturiloj, per aŭtoj estas facile tien alveturi. Precipe rapide per branĉo de Metroo, kiu estas la plej malnova subterulo en Eŭropo, krom la Londona. Sekve la vizitantoj de la banejo nombras ĉiutage 6—7 mil, somere sur la strando ofte eĉ 8 mil gastojn.

La „Széchenyi" radias en si mem ian familiaran. En la parko, inter maljunaj arboj majeste aspektas la ampleksa konstruaĵo. La kupoloj kaj la gracia fronto plaĉe akordas al la alte susurantaj foliaroj, orumitaj de la sunradioj. Ene de ilia ringo situas la plej granda kuracbanejo de Eŭropo, ĉirkaŭata de aliaj altrangaj najbaroj: la barokstila Agrokultura Muzeo sur insuleto apud la Kastelo de Vajdahunyad, sub kies imponaj muroj trankvilas la Lago; transirante sur ponto oni tuj troviĝas sur la Placo de Herooj, flankita de la Muzeo de Belartoj kaj la Halo de Artoj.

La komencoj

Pasis jam pli ol cent jaroj, kiam en 1868 oni komencis bori surloke de la nuna Placo de Herooj profundan puton sub direkto de inĝeniero Vilmos *Zsigmondy*, eminenta geologo (ankaŭ fama pioniro de alpinismo). Dek jarojn daŭris la borado, siatempe la plej profunda en Eŭropo: el 970 metra profundeco venis supren la atendita termoakvo 73 C grada, abunde, ĉiuminute 528 litroj. Kaj dum jarcento tio neniom ŝanĝiĝis: la varmega akvo ankaŭ nun konvene provizas la proksiman Zoologian Ĝardenon, hospitalojn kaj sportejojn krom la banejon. La pavimento de la granda placo kovras la puton, tiel nevideblan, antaŭ la ĉefa ĉevalstatuo, de la patrujon okupinta duko *Árpád*.

En 1881 ekfunkciis la *Banejo Arteza*, antaŭulo de la nuna. 500 metrojn longa, 150 mm-a tubo kondukis la termoakvon al la banejo, kiu konsistis el komuna banejo kaj kuvoj, kun trinkhalo kaj kelkaj ĉambroj. Baldaŭ vaste populariĝis tiu provizora, tamen tute moderna banejo.

Estas interese, ke la borilo penetris en 917 metra profundo tra karbotavolo duonmetra. Tio pruvis, ke komence de la novepoko de terhistorio tie etendiĝis marĉo. La varieco de la sekcitaj tavoloj, precipe la argilstrioj klare montris, ke plurfoje inundis maro la regionon. Intertavoloj de sablo kaj gruzo signas, ke la maro plurfoje malprofundiĝis.

La prosperado

La ampleksigo de la Banejo Arteza kaj instalo de kuracbanejo komenciĝis en 1909 laŭ planoj de univ. prof. Gy. *Czigler*. La planoj estis kelkfoje reviziitaj, kaj dum tio oni konsideris jam la modernajn, ankaŭ nun validajn principojn de banejoplanado.

La Kuracbanejo Széchenyi estis inaŭgurita en 1913. Per ĝi la ĉefurbo akiris grandiozan instalaĵon, pri kiu rajte fieras la Budapeŝtanoj eĉ nun. Ĝian altan nivelon nur la Kuracbanejo Gellért[2] sukcesis poste atingi.

La ideo pri naĝejo venis jam frue, ankaŭ dum diskutoj pri la ampleksigo. Raporto de koncerna komisiono argumentis en 1912 tiel: „... la banejo situas apud la plej dense loĝataj rajonoj de la ĉefurbo, malproksimaj de la Danubo. Tial ni juĝas grava instali malfermitan naĝejon en la baneja areo — ne nur pro sanitaraj, sed ankaŭ por financaj interesoj..."

Tamen la ĉefurbo nur en 1926 anoncis konkurson pri planoj de naĝejo kaj „popolbanejoj". Gajnis ĝin I. *Francsek* arkitekto, kaj laŭ liaj planoj jam post unu jaro ekfunkciis la nova naĝejo kaj la popolbanejoj de viroj kaj de virinoj.

La „Széchenyi" kun siaj multspecaj servoj jam kvazaŭ „banejkomplekso" bezonis pli kaj pli da akvo. En la proksimeco estis borita nova puto eĉ pli profunda — 1256 m —, kiu suprenigas ĉiuminute 3200 litrojn da termoakvo 76 C°. Tiu puto II, funkcianta depost 1938, liveras la plej varman termoakvon el inter la Budapeŝtaj putoj. La propra akvoproviza sistemo malvarmigas de 76° gradoj ĝis la bezonata, helpe de malvarmeta akvo el aliaj dek putoj.

Pro la akvoabundo nek la strandbanejo, nek la ceteraj banservoj de Széchenyi kapablas ĉiom utiligi. Tial oni provizas de tie la proksiman loĝrajonon, la sportnaĝejon de fervojistoj, plurajn aliajn banejojn (Szabadság, Újpesti), la Zoologian



Parto de la Strandbanejo Széchenyi (vide de la spekto-sidejo)

Ĝardenon, ankaŭ la propran ĝardenkulturejon de la ĉefurba banejdirekcio. Somere la akvo de la naĝejaj basenoj helpas plenigi la Lagon de la Urba Arbareto.

La akvo de ambaŭ putoj estas alkala, klorida-sulfata mineralakvo, kalcia-magnezia-hidrokarbonata kun signifa enhavo da fluoridoj kaj silikat-jonoj.

La termoakvon de la Kurac-banejo Széchenyi oni utiligas

— *per banterapio:* ĉe degeneraj artriko-malsanoj, kronikaj kaj kvazaŭakutaj artrikoj;

— *per ŝlimterapio:* por virinoj kuraci kronikajn inflamojn de utero kaj apudaj organoj, neevoluintecon, neregulecon de la monata ciklo;

— *per trinka terapio:* ĉe kronikaj kataroj de stomako, intesto, galduktoj kaj spirorganoj. La terapioj okazas dum kuracista kontrolo.

Iom pri la kuracado per mineralakvo

Antaŭ ol prezenti la nunan banejon, ŝajnas inde iom flankeniĝi al la problemaro de la mineralakva kuracado.

Pri tio restis spuroj jam el la plej antikvaj periodoj de la homaro. La klarigoj pri la kuracefikoj kompreneble ŝanĝiĝis de tempo al tempo, sed restis la bonaj rezultoj. La antikvaj grekoj registris jam ĝustajn observojn pri kelkaj kuracakvoj, kvankam sen la veraj kaŭzoj — tiujn anstataŭis mitaj fabeloj, dioj kaj nimfoj svarmis laŭ la kredo en kaj ĉirkaŭ la kuracfontoj. La religia spirito de la Mezepoko simile pensis pri la „miraklofaraj" fontoj. Doni sciencan klarigon nur la plej nova epoko kapablas, sekve de la multflanka evoluo de la sciencoj.

Por solvi la sekretojn de la kuracakvoj la esploroj forte vigliĝis en la dua parto de la pasinta jarcento. Oni klopodis vaste utiligi la sciencajn malkovrojn — inter kiuj precipe gravega ŝajnis la radioaktiveco por klarigi multajn, ankoraŭ tiam misterajn efikojn de la kuracakvoj. La scienca evoluo eksvingis la balneologion, sed en la lastaj jardekoj tio *bremsiĝis* pro la grandiozaj medicinaj malkovroj. La novaj teorioj kaj rezultoj tiris for la atenton de la sciencaj institutoj kaj esplorantoj. Salvarsano, inzulino, sulfonamidoj

La Strandbanejo Széchenyi — dekstre la kuracbanejo

kaj antibiotikoj, vitamin- kaj hormonpreparaĵoj, kortizono alportis rapidan, bone observeblan saniĝon ĉe multaj, ĝis tiam preskaŭ nekuraceblaj, fatalaj malsanoj. Tiurilate malfermiĝis tre esperigaj horizontoj antaŭ la esploristoj.

Al multaj ŝajnis, ke la kuracakvoj, kiuj efikas malrapide kaj ne utiligeblas kontraŭ akutaj malsanoj, iom post iom iĝas superfluaj! Tiucelaj observadoj estas tro longdaŭraj postulantaj daŭran paciencon kaj detalemon pri ŝajne ne aktualaj, ne tre ambiciondonaj problemoj. Sekve, kvankam sciencon interesas ĉiaj nesolvitaj problemoj, la alien orientiĝo de esplorinstitutoj kaj la objektivaj malfaciloj en la balneologio grave fortiris la esploristojn de tiu ĉi scienco-branĉo. En la medicina fakliteraturo tutmonde minimumiĝis la nombro de esploroj pri kuracbanejaj efikoj.

Tamen nun intervenis la socia evoluo, la necesa prizorgado pri personoj maljunaj aŭ labormalkapablaj, nek malpli la sekvoj de industriigo. Fortikiĝis la intereso tra la tuta mondo pri sanigo kaj zorgado de la kronikaj malsanuloj. Ĉe kuracado de tiaj malsanoj (aŭ malbonfartoj) estas gravega konvene *influi* en la organizo la reagon kaj rezistan kapablojn. Tiun taskon la medicina scienco ankoraŭ apenaŭ solvis. Sed inter la tiucele disponeblaj rimedoj troviĝas la altefikaj mineralakvoj. La praktikanta kaj la preventa[3] medicino povas unuavice apliki la kuracakvojn favore al grandaj homamasoj.

Jen, kio klarigas, kial kreskas denove en monda skalo la intereso al kuracbanejoj, kial tre multaj atendas sian resaniĝon de ili. Ţion montras inter aliaj ankaŭ la kreskanta vizitantaro de la Budapeŝtaj kuracbanejoj, ne laste en la „Széchenyi". La signoj aludas videble al monda renesanco de la banejkulturo.

La nuna aspekto de la Kuracbanejo Széchenyi

Post la supra devojiĝo ni invitas la leganton iom promeni por rigardi la banejon, ĝiajn konstruaĵojn kaj servojn.

La ĉefa fasado orientiĝas suden al la parko. La interno de la kupolo kaj la barelvolboj estas arte dekoritaj ĝis la kornico pere de riĉa vitromozaiko.

En la baneja komplekso funkcias termobanejo, „popolbane-

Eĉ dum frosta vintro estas frekventataj la varmakvaj basenoj

jo", ŝlimterapiejo, sekcioj de bankuvoj, fizikoterapio kaj elektro-meĥanoterapio. El la majesta kupolhalo, garnita per mitaj statuoj, ni aliras al la vira kaj virina termobanejoj.

La *termobanejo* por viroj enhavas 174 kajutojn en la vestiĝejo, de kie oni iras tra duŝejo en la basenhalon. La ortangula unua baseno varmas je 38 C⁰. Meze de la halo baseno duoncirklo-forma invitas ripozi en ĝi. Ĉirkaŭe inter kolonoj masaĝejoj, duŝoj kaj malvarmakvaj basenetoj videblas. Preterante la sekan kaj malsekan vaporkamerojn, en alia ejo ni atingas la plej grandan — 34 C⁰ — basenon de 61 m² surfaco. Surprize ampleksa halo prezentas sin al la gastoj por ripozi post banado sur kuŝejoj.

La termobanejo por virinoj same enhavas kvar basenojn kun 80 kajutoj kaj 90 vestaĵŝrankoj. La baseno 38 C grada ampleksas 20 m², la 36 C grada kun sia 50 m² estas la plej granda, la ceteraj 34 C kaj 30 C gradaj basenoj ampleksas nur 20, resp. 8 m². Kompletigas ankaŭ unu vapora kaj du varmaeraj kameroj, aldone ĉarma vasta ripozejo.

El la granda kupolhalo larĝaj koridoroj kondukas dekstren kaj maldekstren al du flankkupoloj, kaj ortangule plu. Pretere viciĝas la banĉambroj kun diversgrandaj kuvoj kaj duŝoj. 14 kuvoj havas po 1200 litran volumenon, aliaj 40 kuvoj po 700 litran. Ili ebligas ankaŭ karbacidan kaj salan banon.

Al la tn. *popolbanejoj* ĉe ambaŭ flankoj de la konstruaĵo kondukas apartaj enirejoj. Iam ili akceptis samtempe 90—90 gastojn, sed dum konstruado de la strandbanejo ili ampleksiĝis por akcepti po 320 gastojn.

La vira popolbanejo enhavas 280 vestaĵŝrankojn kaj 3 basenojn: la 33 C grada havas surfacon de 24 m², la 35 C grada 73 m², kaj la 38 C grada 70 m², ĉiuj profundas 1 metron. Al tio tute identas la virina popolbanejo, kvazaŭ spegulbildo de la vira parto. Ambaŭloke troviĝas vaporkameroj, masaĝejoj kaj ripozejoj. En la antaŭparko de la banejo lokiĝis la *trinkejo*.

La plej malgranda sekcio estas por la virina *ŝlimterapio* kun 24 m²-a baseno de 38 C⁰, kaj 27 vestaĵŝrankoj. Specifaj porvirinaj terapioj per kuracŝlimo estas tie aplikataj. La viroj ricevas ŝlimterapion en la maldekstra kuvosekcio.

La *strandbanejo* havas enirejon ĝuste ĉe la kontraŭa flanko de la ĉefportalo jam konata. La

La strandbaseno de la infanoj

komplekso de la tuta kuracbanejo, estante elipso-forma, pitoreske ĉirkaŭprenas la tri basenojn. La arkitekto akomodiĝis tiel bonege al stiloj kaj dimensioj de la kuracbanejo, ke laika okulo apenaŭ povas rimarki diversajn partojn de la konstruaĵoj. La vestiĝejoj sur tri niveloj trovis lokon kun 445 kvarpersonaj kajutoj, 1270 ŝrankoj kaj 2100 pendigiloj, sume por 5150 personoj.

La tri basenoj kuŝas laŭ la longakso de la interno de l'konstruaĵo, meze la granda naĝejo, duflanke la malgrandaj basenoj. La naĝejo estas 50 m longa kaj 18 m larĝa kun profundeco inter 1,20—1,80 m, la volumeno estas do 1200 m^3 da akvo 27 C grada. Statuoj leviĝas super la ondliniaj lateroj; unuflanke super restoracio ampleksa spekto-sidejo atendas rigardantojn de konkursoj.

La malgrandaj basenoj varmakvaj — 38 C^0 — similas al duoncirklo. Ĉirkaŭe ŝtupoj igas pli agrabla la ripozon en la 485 m^2-aj termoakvoj. La okcidenta baseno havas 1,40 metran profundecon, la alia — uzata de infanoj — kompreneble malpli.

La tri basenoj konsistas el ferbetono, la randoj kaj ŝtupoj de la varmbasenoj el kalkŝtono, ĉe la naĝejo el artefarita ŝtono. Interne ili estas kovritaj per plakoj „Mettlaĥi". La strandbanejo funkcias depost 1963 jam ne nur somere; la vestiĝejoj kaj la koridoroj, kondukantaj rekte al la basenoj, iĝis hejteblaj, kaj funkcias kamero de tipo „saŭno" dum vintro.

La tuta strand-areo — krom la basenoj kompreneble — estas agrable uzata ankaŭ por sunbano. Sur la plataj tegmentoj estis kreitaj aparte konvenaj sunbanejoj kaj por viroj, kaj por virinoj.

Videble, ke la servoj de la Kuracbanejo Széchenyi estas vere ampleksaj, tre variaj. La bela banejo estas inda por konatiĝi kun ĝi, kun la multflankaj servoj tie alireblaj.

Tradukis E. *Fenyvesi*

1. Prononcu: seĉenji.
2. Vd. en H. V. 80/1 nro.
3. Preventi: antaŭmalhelpi malbonon, malsanon ktp. (PIV)

ROMOS ízű
CITROMOS ízű
HUNGARA
DOLĈAJINDUSTRIA
ENTREPRENO

GAJA PAĜO

Jes, ja, la psikiatrio...

— Kara kolego doktoro, kion vi pensus, se du brakoj ĉirkaŭprenus vian kolon?

— Tion, ke iu volas min sufoki.

— Kaj se tiu persono promenas en mallonga jupo, sekvata de multaj okuloj?

— Evidente, temas pri skoto.

— Brave! Vi estas sana! Sed se vi aŭskultus, kiel reagas miaj pacientoj je tiuj demandoj...

...kaj la risko:

— Imagu doktoro! Mi ĉiam opinias, ke verdaj musoj kuradas sur mi. Ho! Rigardu, ankaŭ nun!

— Bone, bone, tamen ne pelu ilin al mi!

Sed la pacientoj...

— Terure mi frostas en tiu ĉi mantelo.

— Kial do vi ne demetas ĝin?

...ĉiamaj esperantoj

— Ĉu al mi licas trinki alkoholaĵon, doktoro?

— Mi diris jam hieraŭ: eĉ ne unu gluton!

— Mi pensis, ke dumtempe eble progresis la medicino...

...eĉ se maljunaj:

— Vi estas ja okulkuracisto! Mi sopiras vidi... mian filon. Bonvolu instigu lin viziti min...

Ne frenezo!

Komputilo ricevas indikojn pri *Diogeno:* li loĝas en barelo, tagmeze per lampo serĉas homon surstrate, ktp...

La maŝino eligas la rezulton: „Li estas sendinda al alkohol-dekutimiga terapio!"

Kaj la amaskomunikiloj:

En korto de frenezulejo iu suprengrimpas sur altan stangon, kaj tie alpinglas skribaĵon. La aliaj unu post la alia grimpas supren. De revenanto kuracisto demandas, kio estas supre legebla? — „Plugrimpi estas danĝere."

Nova varianto de malnova fabelo

— Se vi *ne* reĵetos min en la riveron, mi plenumos viajn tri dezirojn! — diris la fiŝo al la bonkora fiŝisto.

Tute ne fabelo!

— Ĉu vi havas faklibron pri infaneduko? — estis demandita librovendisto, — ĉar hontinde, ke mi edukis ĝis nun dek infanojn sen faklibro.

Sorto poeta en 1980

La poeto malsatis. Pli kaj pli malsatis. Nenio povis tion ĉesigi... Lin katenis ja la nenifaremo por ne ekiri al la fridujo...

Poetanima, sed maljuna fraŭlo aŭ ekzemplo pri pronomoj

Li ege sopiris je delikataj karesoj. Kaj li karesis sian propran vizaĝon.

Novico

— Ĉu mi faru foton pri la nova paro dum la kverelado?

...kaj spertulo

— Mi volas aĉeti je kredito. Ĉu vi povus rekomendi du fidindajn garantiulojn, kiuj anstataŭ mi repagus la ŝuldon?

E. F.

Ganfranko kaj Marĉella

„Popolkantistoj" de la Esperanto-movado

La barbokovrita vizaĝo de Ĝanfranko Molle jam estas konata al multaj miloj da esperantistoj, dum la fraŭlino apud li — Marĉella — ĝis nun ravis la esperantistaron nur per sia bela voĉo. Tiuj du junaj geitaloj estas eble la unuaj „popolkantistoj" de la Esperanto-movado: ĝis nun ili jam publikigis plurajn muzik-kasetojn *(La Vojo, Kontakto, Venos liber'* ktp.) kun kantoj propre Esperantaj, kaj tradukaĵoj de internacie konataj politikaj kantoj. Komence de tiu ĉi jaro ili faris turneon en centra kaj norda Italio, kaj ili planas fari similajn rondvojaĝojn ankaŭ en aliaj landoj.

La revo de Kalocsay realiĝanta

„Tutmonda Sonoro" — tio estis la planita titolo de la verko, por kiu laboris dum longaj jardekoj Kálmán *Kalocsay,* eble la plej elstara kaj plej fekunda tradukisto de la Internacia Lingvo. Tiu verko — ampleksega kolekto de poemoj el la tutmonda literaturo — ne povis aperi dum la vivo de Kalocsay, pro manko de eldonistaj rimedoj, kaj ankaŭ pro la fakto, ke li laboris pri ĝi, ampleksigis ĝin eĉ dum la lastaj monatoj de sia vivo.

Laŭ komisio de Hungara Esperanto-Asocio, Ada *Csiszár* kaj Vilmos *Benczik* komencis la redaktajn laborojn de la antaŭvideble ĉ. 600-paĝa unika volumego. Oni esperas, ke la verko povos aperi fine de la venonta jaro.

Kongresaj informoj

Dum la 65-a Universala Kongreso en Stokholmo oni elektis novan UEA-Estraron. Ĝia konsisto estas la jena: Gregoire *Maertens* (prezidanto; respondeculo pri financoj kaj administrado), Flóra *Szabó—Felső* (ĝenerala sekretario kaj respondeculo pri planado), Renato *Corsetti* (vicprezidanto respondeculo pri landa kaj regiona agado), Baldur *Ragnarsson* (vicprezidanto kaj respondeculo pri kulturo), Ursula *Grattapaglia* (respondeculo pri informado kaj delegita reto), Elisa *Kehlet* (respondeculo pri kongresoj kaj virina agado), Petro *Todorov* (respondeculo pri faka agado), Humphrey *Tonkin* (respondeculo pri esploroj, edukado kaj eksteraj rilatoj).

Ankaŭ en la 36-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (okazinta en Rauma, Finnlando estis elektoj; ĉi tie prezidanto fariĝis la hungaro Csaba *Lendvay*. Do: ĝenerala sekretariino de UEA estas hungarino, prezidanto de TEJO estas hungaro... ĉu eble tro da hungaroj?

Kaj ankoraŭ plia hungara, pli precize hungaraĉeha sukceso. Premion *„Schwartz"*, kiu jam de pluraj jaroj logas la esperantistajn romanistojn (temas pri konsiderinde alta monsumo) gajnis la hungaraĉeha geedza paro Éva *Tófalvy* kaj Oldrich *Knichal* per sia kune verkita romano „Kiuj semas plorante". Espereble tiu romano povos baldaŭ aperi libroforme. Cetere, por gajni la elitan premion konkursis entute 10 romanoj, kaj estas tre probable, ke ankaŭ inter la ne-gajnintaj verkoj troviĝas kelkaj eldonindaj romanoj. Ĉu la Esperanta romano havos renesancon?

Por atento de sovetaj esperantistoj

Ĝoje ni anoncas, ke Esperantlingvaj libroj, eldonitaj en Hungario, povas esti aĉetitaj en Sovetio pere de la Estona Filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. Mendojn bv. adresi al K-do Johannes PALU, Solme 21. 200016 TALLINN, Estona SSR. Jen, specimene kelkaj el la haveblaj titoloj:

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO (604 p., 24 cm, bindita.) Prezo: 13,75 rubloj.

AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO (144 p., 24 cm, ilustrita. Tre taŭga progresiga lernolibro.) Prezo 2,75 rubloj.

B. PRUS: LA FARAONO (44 p., 24 cm. Bildrakonta adaptaĵo farita laŭ la pola klasika verko. Tre taŭga legaĵo por komencantoj ankaŭ.) Prezo 1,10 rubloj.

HUNGARAJ FABELOJ (71 p., 20 cm. Ilustrita.) Prezo: 2,75 rubloj.

Estas mendeblaj entute pli ol 30 libroj! Bonan legadon!

LEHEL

Vojaĝante, ripozante

SIFONO



Produktas:

HŰTŐGÉPGYÁR

Edwin de Kock

DANKON AL DU

1

Kvarjaran flegis min
la nigra servistino, Maggie.
Ho manoj mildaj kiel voĉo
de arbarkolombo . . .

Por mi ŝi estis pli patrin' ol panjo,
plorema kaj malsana
post morto de la Dujarulo,
blondbukla frato, la mistera
kun kiu enteriĝis ŝia tenereco.

Maggie, vi lavis kaj vi vestis min
kaj min, kantante,
por ĉiuj jaroj premis
al via varma sin' Afrika, nigra kiel amo.

Tro baldaŭ mi vin perdis
en malproksimojn de novluna nokto.

Jam estis grila tempo kaj fulgora*.
Sur nia rosa farmo
kandelo kaj la bruoj estingiĝis.
Nur steloj palpebrumis plu,
dum pado vian koron forkondukis
al la riveraj transirŝtonoj,
por ombra rendevuo en arbustoj
kun la tranĉilo de edzin' ĵaluza.

Terura la gepatra flustro
en grizaj antaŭhoroj de l' maten',
malplenigita.
„Ne veku la infanojn!"
La povran multpikitan korpon,
sensange vaksan,
mi poste vidis sur la kuireja planko
sub litkovril' makula.
Vekri' de revokanta infansolo
en la malpleno ne atingis vin.
Ni donis vian karnon
al pluva trivo kaj la sunsilentoj,
kun nomtabulo ligna
kiu tre baldaŭ putris for.

Sed jen en mia sango vi pluviglas
post ĉiuj miaj jaroj,
malgraŭ la troaj sperto kaj renkontoj
per kiuj konfuziĝas la memoro;
kaj nun la mondo ne forgesos vin.
Pro via suna varto, Maggie,
la Blanka vintro ne glaĉeris mian koron,
ĉar frue la okuloj lernis vidi
ne haŭtojn sed la homojn.

Afrika karesem' por blankulido,
lulkantoj de l' popol' Xhosaa.
kormildo kiu transpersistis
el aspra histori',
la novkontuza
aŭ antaŭlonge disperdita
en la arbaroj aŭ la step' senspura,
distancoj kaj antikva vento.

Per kiu amo amon dotis,
suspiri plu en lingvo nerevata
de hom' al homo.

2

En infanaĝ', memorprofundoj,
daŭre moviĝas kontraŭ montoflanko
figur' de nigra viro, homo.
Nebuloblovoj
dum horo ne mortiva,
por ĉiam disigita
de l' forvaporiĝintaj jaroj.

Por hejmenigi la brutaron,
sesjara, mi lin akompanis, nepetite —
serviston kies nomon mi ne konis.
Sur la krutaĵ' subitaj neĝhajleroj
forfrapis mian spiron,
kaj fridponardoj min trapikis tute.
Sed li rimarkis kaj la propran jakon,
ĉifonan pro servuta malriĉeco,
forprenis de la ŝultroj ektremontaj
kaj ĉirkaŭ, super min konstruis
sekuran,
aŭtente nigrulejan dometaĉon.

Tra ĝiaj konservitaj fum' kaj ŝvito
mi flaris
profundojn de la muta amo, kiu min,
la blankrasistan idon,
per varmo prae homa
dum kelkaj korsekundoj venkis.

En horo kiam la nebuloblovoj
kontraŭ la montoflanko
fridon alportis.

* Insekto, el la ordo de hemipteroj

Paĝo de komencantoj

La hundo

Mi lernis en la lernejo, ke hundo ŝatas la homojn. La homoj donas manĝaĵon al la hundo. Ĝi loĝas en la ĝardeno, en malgranda dometo. La hundo priatentas la havaĵon de la familio. Oni diras, ke en Svisio sur la altaj montoj, se falas granda neĝo, multaj homoj malaperas, tiam la hundoj donas helpon por trovi ilin. La hundoj kunportas varman teon kaj liberigas la homojn el la vintra neĝo. La hundoj surhavas blankan tabulon, sur ĝin oni pentris ruĝan krucon, ke la malfeliĉaj homoj ne timu la agrablajn grandajn hundojn. En la montaj domoj oni donas kuracistan helpon kaj liton por la malfeliĉuloj, kiujn la hundoj kun la helpo de bonaj homoj levis el la neĝo.

Sur tiuj partoj de la mondo, kie estas malvarmo, nigraj noktoj kaj multe da neĝo, la homoj uzas hundojn por labori, ofte dum longa tempo kuras la hundoj, kiujn la homoj ligis al veturbenko kaj per tio oni povas vojaĝi.

Oni povus diri multajn ekzemplojn pri la hundoj, kiuj multflanke servas la homojn. Se oni lasas la hundojn liberaj, ne tenas ĉiam en la loĝejo, la hundo iĝas forta kaj sana. Do, la hundo ne povas elekti, kion ĝi faru kaj kie ĝi loĝu, la homo donas al ĝi taskon, aŭ lasas ĝin malfortiĝi.

Nun mi diras alian ekzemplon, kiam oni ne ekzercas la hundon, male permesas ĉion laŭ la deziro de la hundo.

Iam mi kun mia edzino vizitis niajn geamikojn, kiuj loĝis en ĝardenhava domo. En la ĉambro sur la lito kuŝis la mezgranda nigra hundo, kiu dormis kiel infano kaj bone estis videblaj ĝiaj grandaj malplaĉaj dentoj. Mia amiko mallaŭte diris, ke ni lasu la karan estaĵon dormi, ĉar „ŝi" estas laca.

Poste ni altabliĝis kaj sidis silente. Mi rimarkis, ke sur la tablo estas kvin teleroj por kvar homoj. Post nelonga tempo aperis la dolĉa hundino kaj sidiĝis apud la edzinon de nia amiko ĉe la tablo, kaj metis la antaŭajn piedojn sur la tablon. Apud la telero estis pano, kiun la hundo ŝajne ne ŝatis, ĉar „ŝi" forigis ĝin sub la tablon. La edzino de nia amiko gaje ekkriis, ke la kara hundo havas bonan memoron, ĉar por ĝi la pano ne estas bongusta.

Sekvis la tagmanĝo. La edzino manĝaĵon. Per la sama kulero ĝi ricevis la unuan kuiritan manĝaĵon. Per la sama kulero la edzino manĝis la duan, la hundo la trian, la edzino la kvaran parton de la manĝaĵo ĝis la fino. Vidante tiun maldezirindan aferon, kun mia edzino ni ne akceptis la manĝaĵon, ni diris, ke ni fartas malbone.

Dume nia amiko manĝis bonguste. Ni ne volis fari malatenton, tial ni nur trinkis.

Poste la edzino petis la karan edzon, ke li kunportu la veston por la hundo, ĉar la vetero komencas malboniĝi kaj se la hundo sentas malvarmon, tiam ĝi ne restas trankvila ĉe la tablo, eĉ dum la nokto ĝi ne dormas bone en la lito.

Ni tuj alvokis la atenton, ke estus bone al ĝi iom promeni, poste tuj meti en la liton la karan hundeton. Nia amiko akceptis nian proponon kaj akompanis la hundon en la ĝardenon . . .

Szilárd *Bálint*

recenzoj

Bonvena akiraĵo en la porinfana literaturo

Hundbazaro. 33 hungaraj infanpoemoj. — Redaktis: Péter András Rados. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. 68 p., 19 cm. Ilustrita. Prezo: 10,20 ned. gld. (Por Hungario: 40,— forintoj.)

Okaze de la Internacia Jaro de la Infano, Péter András *Rados* havis la bonan ideon kolekti libroforme la tradukojn, kiujn hungaraj esperantistoj faris el poemetoj verkitaj de famaj hungaraj poetoj por la infanoj. Kaj ĉar inter la tradukistoj troviĝas la nomo de Kalocsay (ĉe ok pecoj), oni vidas, ke la redaktinto metis al si ambician celon — malgraŭ lia aserto en la Postvorto, ke „la elekto ne enhavas multajn vere bonajn pecojn el tiaj poemoj": mi supozas, ke tia troigo de humileco kaŝas ian hungarismon, kaj la aŭtoro deziris esprimi, ke lia elekto enhavas nur kelkajn el la multaj vere bonaj poemoj . . .

Plezure mi tralegis, en ĉi tiu bela eldono, belpapera kaj diktipa, tiujn 33 poemetojn por la infanoj (kaj ne „infanpoemojn", kio laŭ mia opinio signifas poemojn verkitajn de infanoj): la originalaj poetoj kapablis lerte adapti sian lirikon al la intelekta kaj afekcia nivelo de siaj junaj legontoj. Bedaŭrinde, kelkaj el la tradukintoj ne montris egalan majstrecon en sia tasko: la eliziojn kaj akcentkarambolojn (de

la poemeto sur p. 35)

ĝi similas je *kur' ven*ton,
ĝi superas je *prez' cen*ton . . .

s-ro Hules uzis probable por konservi la ritmon de la muziko, sed la rezulto en nia lingvo estas fuŝa; kaj kiam la sama tradukinto rimkunigas *Tom* kaj *neniom*, aŭ s-ro Fejes *tien* kaj *jen*, ili simple kulpas gramatikan eraron. Estas ankaŭ iom dubinde, ĉu infanoj komprenos neologismojn, kiel *disto/tristo* (p. 24) aŭ

morna, eĉ pli, moroza hom' (p. 42).

Kontraste pluraj pecoj estas vere ĝuindaj, ĉar simplalingvaj kaj poeziplenaj, ekzemple la *Vaniĝinta plano* de Petőfi, *La Betlehemaj Reĝoj* (t. e. la Tri Magoj) de Attila József, la *Tri leporoj* de Zoltán Zelk, aŭ la humurplenaj kvaroj de Gábor Devecseri. Tiu libro estas tre bonvena akiraĵo en la porinfana literaturo, kaj estus dezirinde, ke multaj gepatroj uzu ĝin por instrui siajn gefilojn pri la ritmo kaj harmonio de nia lingvo. Domaĝe por la ne-hungaroj, ke la respondaj muzikarioj ne estas montritaj: ili solaj donas la tutan kolorbrilon al tiaspecaj versaĵoj.

La ilustraĵoj intencas doni al la aluditaj personoj tian tipan malbelecon, kiu ŝajnas nun laŭmoda, en kio la aŭtorino plene sukcesis. La teksto mem estas tre zorge kompostita: mi notis nur „rebarbo" (p. 52) anstataŭ „rabarbo", kaj mankon de komo post „Paĉj' " (p. 54). Pri la unua verso de la p. 13 „Tra fenestro dom' elsaltis", mi konfesas, ke tia elfenestriĝo de domo restis por mi enigma.

Gaston *Waringhien*

La testamento de Fuĉik en Esperanto

Julius Fuĉik: Riporto skribita en pendumila maŝo. Tradukis Rudolf Hromada. Eldonis: Ĉeĥa Esperanto—Asocio, Prago, 1979. 118 p., 20 cm. Prezo: 10,— ned. gld. (Por Hungario: 45,— forintoj.)

Kvankam la famekonata „Riporto skribita en pendumila maŝo" de la ĉeĥa jurnalisto, nacia heroo Julius Fuĉik, kaŝverkita en la nazia karcero aperis jam en la jaro 1945 kaj ĝin sekvis tradukoj en sepdeko da lingvoj, ĝia Esperanta versio devis atendi preskaŭ tridek jarojn por esti eldonita.

Jam en 1951 esperantigis ĝin la elstara movada aganto Rudolf Hromada, sed samjare estis likvidita la asocio de la ĉeĥaj esperantistoj kaj konserviĝis nur la presprovaĵo de la traduko. La japana esperantisto kaj publicisto Kei *Kurisu*, kiu antaŭ dudek jaroj lektoris en Universitato de Karlo — kaj en tiu tempo jam tradukadis el la ĉeĥa, unue per Esperanto kopiis manuskripte la tradukon. Li ne nur japanigis la Riporton, sed en la postaj jaroj komencis okupiĝi detale pri tiu ĉi furora verko kun la intenco skribi la libron pri ties drameca sorto. Li ankaŭ iniciatis ĝian eldonon en Ĉeĥoslovakio kaj laŭ lia aserto la ĵusa Esperanta traduko devus esti la plej kompleta eldono de la Riporto iam aperinta. Revizion kaj kompletigon de la verko entreprenis Oldrich Knichal — kiu longjare kunlaboris kun K. Kurisu en la perado de la kulturaj valoraĵoj — kaj Vlastimil Novobilsky, kaj fine de 1979 ĝin eldonis Ĉeĥa Esperanto—Asocio en la Praga eldonejo Panorama.

Legantoj de HV, Der Esperantist aŭ de Starto antaŭnelonge povis informiĝi pri la pozitiva sinteno de J. Fuĉik al la Internacia lingvo — laŭ la atesto de la vidvino Gusta Fuĉiková. Tion pruvas krome iuj dokumentoj troveblaj sur la paĝoj de la renoma kulturgazeto Tvorba, redaktita de Fuĉik. Ankaŭ tiu ĉi motivo instigis la eldonintojn klopodi, ke la testamento de la granda ĉeĥa ĵurnalisto trovu sian vojon al la tutmonda esperantistaro.

(kni)

Transparenta ombro

LUMO KAJ OMBRO. Verkoj de Vasilij Eroŝenko. Kompilis Mine yositaka. Eldonis: Japana Esperanta Librokooperativo, 1979. 96 p. 18 cm.

Vasilij Eroŝenko estas certe unu el la plej interesaj personoj de nia movado, kiun oni pli bone konas en Orienta-Azio ol en Eŭropo. Blinda poeto, hero-anima kaj knab-kora, kiu naskiĝis en Ruslando, 1890. Poste li longe vagadis en Anglio kaj Ruslando, veturis aventure tra Hindio, Siamo dum la unua mondmilito; li daŭre studis en Japanio la japanan lingvon kaj literaturon, eĉ verkis nem japanlingve poemojn kaj prozaĵojn. De tie forpelite (1921) kiel suspektinda fremdulo, ruso, li loĝis en Pekino ĉe la granda verkisto *Lusin*, instruis — ankaŭ tie — Esperanton, profesoris en la Pekina Universitato ĝis sia rehejmiĝo en 1923. Li mortis en 1952.

Verkoj de Eroŝenko — poemoj, rakontoj, fabeloj, eseoj — estis konataj kaj ŝatataj de la granda publiko en la orientaj landoj: publikis ilin nacilingvaj revuoj, apartaj volumoj ree eldonataj (ankaŭ Lusin tradukis kelkojn el la japana!). Li perceptis la orientan pensmanieron, rave personigis aĵojn de la kosma naturo, tiel la tutan animon dediĉanta Eŭropano forte impresis la koron de la publiko japana kaj ĉina.

Oni ne miskomprenu: personeco kaj karaktero popola de Eroŝenko prave kaptis la korojn. Homaranisma amo, same kiel klasbatala braveco, kortuŝa sentimentalismo kun aplomba konscio — jen trajtoj, kiuj eĉ en satiroj ne malaperas en liaj skribaĵoj tra ĉiuj liaj riskoplenaj vivstacioj. La poemoj, simplaj sed alkoraj; en la prozo romantikas *ankaŭ* lia poezio: personigita mondo akompanas la paŝojn de la ĉiam-poeto. La blinda poeto *vidas* kaj rave vidigas, kio estas plendinda kaj esperinda en la orienta mizerego de la 20-aj jaroj, enfabeligas kaj la dolorojn, suferojn, kaj la baraktadojn, luktojn.

Lia peniko foje akre konturas, foje dolĉtone rakontas, kaj per tiu flua, rula stilo — por multaj skribemuloj studinda! — tre ofte leganto estas katenita sekvi eĉ senpretendajn scenojn, kaj pli postulemaj legantoj forgesas pri lingvaj nekutimaĵoj, malofte troveblaj misgramatikaĵoj. Malmoderna? Jes, tamen liajn rakontitajn metaforojn certe multaj dum trankvila horo legos, ĉar tiuj levas ilin al noblaj sferoj.

E. *Fenyvesi*

Egyesült Vegyiművek

Unuiĝinta Kemifabrikaro

Cefaj produktaĵgrupoj de la firmao:

PLASTINDUSTRIAJ MOLIGILOJ:

por apliki ĉe produktado de artledo, PVC-planko, aŭtotapetoj, elektraj izoliloj

SAŬMIGILO POR PLASTOJ:

por apliko ĉe produktado de PVC-planko kaj artledo

SAŬMKREAJ MATERIOJ:

por fajrobrigado

POLIKONDENSAJ REZINOJ:

por apliki en fergisejoj kaj en lignaĵ-industrio

TEKSTIL-, KAJ LEDINDUSTRIAJ HELPMATERIOJ

ESTEROJ, SOLVILOJ:

por apliko en farb-, lak-, kaj medikament-industrio

EMULSIGAJ KOMBINAĴOJ:

por uzi ĉe pesticidoj*

Lav-, kaj purigaj drogoj, aŭtokonservadaj artikloj de marko „Ultra"

Pri niaj produktaĵoj informojn donas:

EGYESÜLT VEGYIMŰVEK
VEVŐSZOLGÁLATI OSZTÁLY
Budapest VI., Izabella u. 68/b
Telefono: 329-954, Telekso: 22-4788

*pesticido: drogo por ŝirmi plantojn

Infanvestoj el Hungario



Hungarajn infanvestojn por 2–12 jaruloj eksportas

HUNGAROCOOP Kooperativa Entrepreno

por Eksterakomerco

H—1051 Budapesto, Október 6. str. 12.

Tel.: 329-328 **Telekso: 22-4859**

LETERKESTO

Spartaco F. Tarlindano, I, Venecio: Feliĉe, ni ankaŭ konas la „reĝinan" belegan Venecion, kvankam ne tiel profunde kiel vi — sekve ni ankaŭ rimarkis la misfaron de la preseja koboldo en la nro 5/1979, p. 194. Dum korektado de la dua vico en „La defraŭdanto" anst. *sur* misiĝis *sub*, kaj du vicoj *tute forfalis*. Origine la teksto devis esti tia: „Adelaida kaj Roberto kune sidis en Venecio sur »Riva degli Schiavoni« — la kajo de l' slovenoj — ne malproksime al la »Ponto dei Sospiri« — la ponto de ĝemoj..." (aŭ sopiroj). Ni petas pardonon de niaj legantoj, kaj precipe de la Veneciaj samideanoj, kun danko pro via afabla rimarkigo.

Junulara E-Klubo FENIKSO, SU—Latvio, Riga: Inter la multaj varm-amikaj salutoj, venintaj el la tuta mondo al nia modesta redakcio, via salutletero, subskribita de la tuta anaro, tuŝis nin vere ĝis koro. Se nia laboro atingas sukcesojn, certe la plej ĝojinda sekvo estas, se la hungara movado — *kiel vi asertis* — prezentas helpon al aliaj movadoj kaj liveras ekzemplojn — por utiligi ilin! Multan feliĉon por vi ĉiuj!

S-ino Linde Knöschke, GDR, Berlin: Ni dankas viajn helpajn rimarkojn kaj konsilojn pri la enhavo. Ĝuste pro la varieco de HV necesas la reagoj kaj sugestoj de nia legantaro — de vi jam plurfoje ni ricevis tiajn, kaj plezure por ni. Sukcesojn por via agado!

D-ro Josef Kondor, FRG, Neuwied: Gratulon pro la vere grandioza atingo koncerne la kampanjon esperantistan favore al la lepruloj: pli ol 12 mil DM el disvenditaj E-glumarkoj! Ni konsideras vian vastan propagandon ĉiam konforma al la internaciismo kaj humaneca helpemo de nia 93 jara movado. Vian informon pri hungare parolantaj vilaĝanoj ĉe Mongolio, ni transdonis al scienca asocio por esplori la — ĝis nun ne konatan — interesvekan aferon.

Franz Peter Kurtz, GDR, Schwerin: Solvoj de enigmoj, ktp. estas ĉiam sendeblaj, eĉ malgraŭ la malfrua apero de HV. Ĝuste tiu — plurfoje ripetita — alvoko kaŭzis, ke foje ne estis publikigita la solvo. Tamen, almenaŭ pli poste, ni klopodos presigi la solvojn por tiel informi la legantojn. Bedaŭrinde ni ne scias pri iu P. Pethő, kiu batalis laŭ via kono dum la kontraŭ-Habsburga milito en 1848/49. Ni rekomendas al vi, turnu vin al la Landa Arĥivo (Orsz. Levéltár), Budapeŝto, Vár, H-loll, (eblas ankaŭ E-lingve, sed rimarku tion klare), kaj petu informon kiel parenco.

Stanislav E. Kotljarov, SU, Meĵdureĉensk: Kiel prezidanto de la loka E-Klubo vi devis plendi pri ege malfrua alveno en 1979, eĉ pri manko de numero koncerne nian revuon. Bedaŭrinda afero okazis ĉe la tiea gazetagentejo, ĉar la mendo — 300 ekz. — de ĝi alvenis *nur* dum la pasinta aŭtuno. Estos facile kompreneble, ke tiun kvanton, eĉ la mendon, meze de la jaro, ni jam ne atendis, des malpli ni povis ĝin antaŭvidi. La sekvo kompreneble restis, ke la 4/1979 numeron ni ne povis ekspedi en la dezirita kvanto, eĉ la aliajn nur per aparta fortostreĉo. Dum 1980 tio ne povas okazi, ĉar ASE jam ĝustatempe informis nin, ke kolektiĝis preskaŭ 1000 abonoj en SU. Do ni presigis sufiĉan kvanton (jam antaŭ la alveno de la oficiala mendo de „Sojuzpečatj") da ĉiuj numeroj! Ni esperas, ke ankaŭ plu viaj abonantoj kaj legantoj havos same multe da plezuro. Akceptu niajn manpremon kaj bondezirojn!

Arturs Kubulnieks, SU—Latvio: La supra informo rilatas ankaŭ al vi. Kiel vi povas vidi, ankaŭ en la ĉijaraj numeroj ne mankas humuro, venos foje eĉ la *Malplena Vortaro*, por helpi al „bona humuro por la tuta tago". Kvankam ni ne estas saĝaj homoj, kiel vi supozas, tamen farizeaj ankaŭ ni ne estas; ĉar „nenio, kio estas homa, restas al ni fremda". La poemo sendita montras vin spritulo, sed ĝi ankoraŭ ne atingis Parnasan altecon. Saluton!

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Êva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Cefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H—1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,— al eksterlando por unu jaro 78,— forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. — 80. — 199 — Nyírségi Nyomda Responda gvidanto: Zoltán Jáger, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

Dum ekskurso, en teo,
ĉe sporto, en limonado

MIKÖV

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1725 Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefono: 476-716, 573-088

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért